



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Julio 2020 n-ro: 55



Merhaba,

Korona virüsü pandemisinde ikinci dalgayı yaşıyoruz veya yaşamak üzereyiz. İnsanlar neden bu kadar anlayışsız ve aptal ki? Maske takmayı rededenler, sosyal mesafeye önem vermeyenler, yaşlılar dikkatsiz, gençler ise nasıl olsa bana bir şey olmuyor tavrı içindeler. Sadece sade vatandaş değil siyasi liderler de öyle. Ancak genç olsun yaşlı olsun, korona virüsüne yakalanıp sağlığına kavuşanların sağlığı artık eskis gibi olmadığı da konuşuluyor. Zaman içinde bu insanların bir çok başka hastalığa yakalanacakları söyleniyor, alzheimer'dan kalp sıkıntılarına...

Evde kalın ve "Turka Stelo" dergisini okuyun. Bu sayıda da sizlere zengin bir seçki sunuyoruz. Haberlerden, hikayelere, şiirlerden bulmacalara ve çok daha fazlası.

Hepinize iyi okumalar !


Saluton,

Ni eble vivas aŭ baldaŭ vivos la duan ondon en la kronvirusa pandemio. Kial homoj estas tiom nekomprenemaj kaj tiom stultaj? Tiuj, kiuj rifuzas porti maskon, tiuj, kiuj malatentas la socian distancon, maljunuloj estas neatnetmaj, junuloj kun la sinteno, ke la viruso ne malutilas al ili. Ne nur la civitanoj surstrate sed ankaŭ la politikaj gvidantoj havas la saman sintenon. Tamen, ĉu junaj, ĉu maljunaj tiuj, kiuj kaptis la viruson kaj resaniĝis ne plu havos la saman sanon ili havis antaŭe. Oni parolas, ke dum tempo tiuj kaptiĝos en diversaj malsanoj, de alzheimero ĝis koraj problemoj...

Restu hejme kaj legu la "Turka Stelo" revuon. Ankaŭ en ĉi tiu numero ni prezentas al vi riĉan elekton de novaĵoj ĝis rakontoj, de poemoj ĝis kurcortentigoj kaj multaj pliaj.

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:

Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Ciklo kun Hori Jasuo	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Prezidantoj de UEA	4
El verkoj de FeZ	4
Tempo Sigelita	5
AJAKSO-TEŬKRO (ΑΙΑΣ-ΤΕΥΚΡΟΣ)	6
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	10
Kion vi farus?	11
Du Bareloj	11
Amuza Matematiko	11
El la literaturaj paĝoj de MAS	12
La naŭ instruistinoj el Parnaso (2)	14
La Kimero-Rakonto el la estonteco (2)	16
Astrologio kontraŭ Psikologio - Julio/Kankroj	17
El la libro de "Dao de Jing" (46)	19
Vizaĝoj	19
Ŝercoj	20
Kurcvorttenigmo	21
Patricia (1986)	22
Ho Mia Dio!	22
La poetoj detruas nian lingvon!	23
Elplugu Floron	24
Poeziaĵoj de Ilir Zhiti	24
Victor Sadler forpasis	25
Reĝo Demetrio (Ο Βασιλεύς Δημήτριος)	26
La dometo de feliĉo	26
Bill Chapman forpasis	26
Komentario de Dr. Hinohara Ŝigeaki	27
Louis Beaucaire: Kiel mi fariĝis	
kunfondinto de UEA	29
Por venki rugbeajn miksbatalojn...	30
Facilaj rakontoj	32

Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj. Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo.

Ciklo kun Hori Jasuo -- poemoj de Elena

Doktoro helpas,
malgraŭ la virus'. La horo
estas juvelo.
Kaŝe ridas iuj, pro
okazaĵo de gajnoj.



Komuna ago
en Esperantujo – ja
flor ' ne velkanta.
Amikeco sen limoj,
portas lumon en l' koroj.



Homoj kun maskoj –
nun monda panoramo
pro la kronviruso. Ja
Espero en la arboj –
la vivo ĉiam daŭras...



verkis kaj sendis **Elena Popova** el
Bulgario
bildoj de **Hori Jasuo** el Japanio



Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Karaj,
la Julia sumoo
komenciĝos la 12ŭan de
julio. Mi atendas vian
aliĝon.

Por scii, kio estas la Sumoo, vidu
la suban retejon.

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

HORI Jasuo

371-0825 Japanio, Gunma,
Maebaŝi, Ootone 2-13-3

Retadreso: **hori-
zonto@r.water.sannet.ne.jp**

Nia retejo:

<http://www.esperantosumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/
Internacia_EsperantoSumoo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_EsperantoSumoo)

Fejsbuko:

[https://www.facebook.com/
groups/759066970888217/](https://www.facebook.com/groups/759066970888217/)

UEA



N-ro 888 (2020-06-19)
**MondaFest' 2020:
Somera Inaŭguro, la
20-an de junio
(Programo)**

La 20-an de junio 2020, 12:00
UTC, okazos la Inaŭguro de la
Monda Festivalo de [...]]

N-ro 887 (2020-06-18)

**Mesaĝo de UEA okaze de la
Monda Tago de Rifuĝintoj, 20
junio 2020**

[Mesaĝo sendota al UN]
Laŭ statistiko de Unuiĝintaj Nacioj,
hodiaŭ 71 milionoj da homoj tra la
mondo estis perforte dislokigitaj [...]

N-ro 886 (2020-06-17)

**UEA bonvenigas novan
Kunlaborantan Fakan Asocion:
TEO**

En la pasinta semajno la Komitato
de UEA rete aprobis kunlaboran
kontrakton inter Teamanta [...]

N-ro 885 (2020-06-16)

**MondaFest' 2020: Por la Virtuala
Kongreso Individuaj Membroj
de UEA aliĝos senpage**

Kiel anoncote (uea.org/gk/875a1),
kadre kaj kulmine de la Monda
Festivalo de Esperanto [...]

N-ro 884 (2020-06-08)

**MondaFest' 2020: Inaŭguro (20
junio) kaj unuaj oficialaj eventoj
- rezervu la datojn!**

En la 20-a de majo UEA oficiale
anoncis la realigon de la Monda
Festivalo de Esperanto
(MondaFest' 2020) kaj la [...]

N-ro 883 (2020-06-05)

**Mesaĝo de AVE kaj UEA okaze
de la Monda Tago pri Medio, 5
junio 2020**

Okaze de la Monda Tago pri
Medio (MTM), festata ĉiujare la
5an de junio, UEA kaj la [...]

TEJO



**Partoprenu en
malferma video
de la reta IJK
2020**

La 10-an de julio ekos la unua
reta Internacia Junulara Kongreso
– IJK 2020, kun la temo Tutmonda
Solidareco. Jam aliĝis preskaŭ
200 homoj kaj ni antaŭvidas ke
aliĝos multaj pliaj. [...]

**La novaj Komitatoj B de
TEJO**

Ni ĝojas prezenti al vi la novajn
Komitatojn B de TEJO por la
mandato 2020-2022!

Luana França (Brazilo), Nicolas
Kasolene (Demokrata Respubliko
de Kongo), Alexandre Raymond
(Francio/Brazilo), Robert Nielsen
(Irlando), Michael Boris Mandirola
(Italio/Francio) [...]

**Partoprenu en video pri
Esperanto en Duolingo**

Ĉu vi lernis Esperanton per
Duolingo? Ni volas aŭdi pri via
sperto!

Faru videon kaj rakontu al ni!
La filmetoj kiujn vi sendos estos
[...]

**Universitata vivo dum la
pandemio – Esperantistoj kaj
kronviruso**

En la kvara kaj kvina epizodo de
nia serio Esperantistoj kaj
kronviruso, studentoj rakontas pri
la universitata vivo dum la
kronvirusa pandemio. [...]

Malferma alvoko por IJK 2021

Kandidatiĝu kaj realigu kune kun
TEJO la 77-an Internacian
Junularan Kongreson en via
lando! [...]



Leteroj de niaj legantoj



Hola karaj,
Kvankam en la kondiĉoj de ĝenerala pandemio ankaŭ en la Respubliko de Turkio, "Turka Stelo" ne ĉesas, nek malriĝigas! Kaj tio ĝefe danke al la fervoro kaj diligenteo de ties radaktoro. Certe per tiu ekzemplo vi inspirigas ankaŭ nin ceterajn esperantistojn tra la mondo. Dankon! Mi kaj la edzino baldaŭ revenos hejmen de Dubai al Tirana, tra Istabulo per Turkish Airlines. Ni restas ĉe filo ekde februarofino. Ankaŭ en ĉi tiu araba lando la pandemio trafis milojn da homoj, inter kiuj fremdajn laboristojn kiuj feliĉe estas junaĝaj, pro tio eltenas pli sukcese la infektiĝon. Ni esperu je pli bona estonto por ĉiuj.

Amike

Bardhy Selimi el Albanio



Dankon pro la nova numero de la tre interesa revuo "Turka Stelo".

Amike,

Maria Gracja el Parmo (Italio)



Saluton,

Mi legas "Turka Stelo"n ekde antaŭ unu jaro kaj ŝategas ĝin! Ĉiu monato Spiros Sarafian mirindas min kun siaj eseoj pri Helenujo; Kacu Matoba tuŝis mian koron kun artikoloj pri trankvila morto; Hori Jasuo, kiu verkis pri la tragedio pro la atombomboj, estas genia, kiel multaj aliaj. Ĉu vi povus aldoni mian nomon al la listo de legantoj por ricevi la revueton ĉiu monato aŭtomate?

Gratulon al vi kaj via teamo pro la mirinda laboro!

mario (Mario Morel) el Kanado

Prezidantoj de UEA



H. B. Mudie
(1908-1916)



H. Hodler
(1919-1920)



E. Stetler
(1920-24, 1928-34)



E. Privat
(1924-1928)



L. Bastien
(1934-1936)



K. M. Liniger
(1936-1939)



H. H. Kursteiner
(1940-1947)



E. Malmgren
(1947-1956)



G. Canuto
(1956-1960)



H. W. Holmes
(1960-1962, 1964)



H. Hideo
(1962-1964)



I. Lapenna
(1964-1974)



H. Tonkin
(1974-80, 1986-89)



G. Maertens
(1980-1986)



J. Wells
(1989-1995)



L. Chong-Yeong
(1995-1998)



K. Enderby
(1998-2001)



R. Corsetti
(2001-2007)



P. Dasgupta
(2007-2013)



M. Fettes
(2013-2019)




D. Charters
(2019-)

-- el Verkoj de FeZ

*Fragmento el la parolado de
S-ro Feliks Zamenhof
dum ferma kunsido de la XX-a
Universala Kongreso de Esperanto
en Antverpeno, 1928.*

»Antaŭ ol ni foriros kaj disiros en niajn hejmojn, antaŭ ol ni kalkulos niajn kongresajn impresojn, permesu al mi paroli kelkajn vortojn. Kiam mi veturis ĉi tien, mi havis malgajajn pensojn. Mi timis, ke io eksplodos kaj neniigos nian tutan laboron. Feliĉe la malbona aero disiĝis, kaj ni nun povas libere spiri. La bonaj fortoj venkos. Unu el tiuj fortoj estas la Fundamento de D-ro Zamenhofj.« — »Ne ekzistas perfekteco, eĉ D-ro L. Zamenhof sciis, ke Esperanto ne estas perfekta. Li sciis, ke la estonteco eble poluros ĝin; sed ĝi ne rompos ĝin. Estu la Dudeka altaro, sur kiu estu forbruligata ĉiu malpaco por la bono publika.«



»Pola Esperantisto«, Nr. 8—9., 1928.

Fonto: https://eo.wikisource.org/wiki/Verkoj_de_FeZ/Parolado_dum_la_XX_Univ_Kongr.

KREPUSKA SAMURAJO (originale: TASOGARE SEIBEI)

"Mia patro tute ne havis celon promociiĝi en la mondo. Mi pensas, ke li ne vidis sin malbonŝanca. Li amis siajn filinojn... Bela Tomoe amis lin... Laŭ mi lia vivo estis mallonga sed plenplena. Kia feliĉo por mi, ke mi havis tian patron!"

Ni aŭskultas ĉi tiun rakonton el la buŝo de virino, kiu rememoras sian patron kun amo. La historio de samurajo, kiu ne havis postulojn pri vivo, la historio de la Krepuska Samurajo.



La origino de la vorto samurajo datiĝas antaŭ la "Heian" periodo. Ĝi devenas de la japana verbo "saburau", kiu signifas servi aŭ ĉeesti prete. La vorto samurajo anstataŭigis la vorton "saburau" dum la tempo inter la malfrua 16-a kaj 17-a jarcentoj. Samurajoj estis membroj de la militista klaso. Ili uzis diversajn armilojn kiel sagojn, lancojn kaj fusilojn. Sed ilia plej konata armilo kaj simbolo estis la glavo. Ili portis du glavojn nomitaj "katana" kaj "wakizashi". Glavo estis la simbolo de samurajoj, neniu alia havis la rajton porti glavon. Ili neniam humiliĝis uzante siajn glavojn en ordinaraĵoj kaj personaj aferoj. La samurajoj estis distingitaj membroj de la militista komunumo ("buke") ĉe la supro de la "Heimin" klaso, kiun formis kultivistoj, metiistoj kaj komercistoj, kiuj konsistigas grandan parton de la japana socio. Ili defendis komercistojn, metiistojn kaj kamparanojn kontraŭ banditoj. Sed ne ĉiuj militistoj en la japana historio estis samurajoj, eble surprizo sed ne ĉiuj samurajoj estis militistoj. Kvankam ilia tasko estas batali, multaj valoraj talentoj en belarto ekaperis el ili. Krom glavoj, pafarkoj kaj lancoj, ili ankaŭ perfekte uzis plumon, penikon kaj fluton. Samurajoj estis la sola klaso permesita porti familinomon en la tempo de sia regado. La familinomo, pri kiu ili fieris, estis ĉiam skribita antaŭen. La formiĝo de la samuraja klaso estis semita en la 7-a jarcento. Samurajoj estis militistoj ligitaj al la feŭdaj sinjoroj de Japanio, konataj

kiel "Daimyo." Ĉi tiuj militistoj vivis kun unika kodo de etiko nomata "Bushido" aŭ "Vojo de la Militisto".



Samurajo, kiu perdis la militon aŭ malsukcesis, sinmortigis sin tranĉante sian ventron per tranĉilo. La ago de sinmortigo, kiun ili nomis "seppuku", sed konata en la okcidenta mondo kiel "hara-kiri", estis ago kiu liberigis la honoron de la samurajo. Eĉ sia malamiko montrus grandan respekton al samurajo faranta "seppuku", ago, kiu kaŭzas teruran doloron. Se Samurajo eskapis de "seppuku", aŭ lia sinjoro mortis, aŭ faris eraron en lia servo, lia rango estis malpromociita al "Ronin". "Ronin" signifas "senlaborulo" en la japana.

La samurajan tradicion forigis imperiestro Meiji en 1876. Ĉi tiu procezo laŭ iuj fontoj komenciĝis en 1868. Kvankam la samurajo oficiale fariĝis historio, ĝia spirito daŭris tra tempo kaj la arto de glavo ankaŭ estis uzata kiel sporto. En la Samuraja Kulturo - samkiel "Ninjutsu" Kulturo de Ninĝoj - ekzistas ĉina influo. Samurajoj estis bonkoraj kaj noblaj militistoj, kiuj adoptis la principojn de Konfuceo. En la filmo, ni vidas ĉi tiun elementon en la dialogo de Samurajo Seibej kun sia filino:

Seibej - "Kayano ... Ĉu tio ne estas la vorto de Konfuceo? Kiam vi komencis lerni ĝin?"

Kayano - "Fine de la pasinta monato ... La instruisto diras, ke eĉ la knabinoj nun devas legi ĝin."

Seibej - "Tio estas bona. Mi legis Konfuceon multajn fojojn dum mia infanaĝo."

Kayano - "Paĉjo se mi lernas kudradon, mi iam povos komenci fari kimonojn. Sed kion mi gajnos pere de la legado de libroj?"

Seibej - "Sed vi scias, legado donas forton al vi. Potenco al pensado. Kiom ajn la mondo ŝanĝiĝos, se vi havas la povon pensi, vi ĉiam trovos manieron pluvi. Ĉi tio validas por ambaŭ knaboj kaj knabinoj."



La patro diras tion en feŭda kulturo dum la alproksimiĝanta "Meiji" periodo kaj la reformoj. Sed kompreneble li ankaŭ ne estas simpla kamparano. Samurajo signifas trejnita batalisto. Fizike kaj intelekte trejnita. Sed

>>25

Unu el la plej grandaj, plej signifaj kaj gloraj helenaj gentopatroj estis Eako (Αιακός), unu ankoraŭ filo de Zeŭso (Ζεὺς) la dio – reĝo de la tuta mondo. Eako estis la sola homo, kies preĝpetoj estis ĉiam favore akceptataj de ĉiuj dioj, ĉar li estis la plej prudenta, plej justa kaj pia el ĉiuj mortemuloj. Estas pro tio, ke post sia morto Eako iĝis



unu el la tri juĝantoj de la mortintoj en la suba mondo, en Hadeso (Αἴδης). De Eako devenis tre multaj el la plej renomaj, grandaj helenaj herooj, patroj de novaj gloraj gentoj, fondintoj de potencaj ŝtatoj dise en la tuta Helenlando. Unu el la filoj de Eako estis Telamono (Τελαμών), unu el la plej famaj malnovaj helenaj herooj. Li estis intima amiko de Heraklo (Ἡρακλῆς), li akompanis, apudstaris kaj helpis la grandan heroon en kelkaj el liaj mond-famaj grand-faroj kaj bataloj. Post longa tia armilagado, Telamono, en matura aĝo, ĝuante la ĝeneralan rekonon, estimon kaj respekton de ĉiuj helenaj regnestroj, detiriĝis en sia propra reĝejo, en Salamiso (Σαλαμίς), la insulo ĝis nun mond-konata pro tio, ke apud ĝi, multajn jarcentojn post Telamono, okazis la plej granda marbatalo de ĉiuj historiaj tempoj, inter la helena kaj la persa milit-flotoj.

Filo, la unua filo de Telamono estis Ajakso, la plej forta kai unu el la plej gloraj protagonistoj de la tuthelena armeo dum la Troja milito. Tiu Ajakso estis viro neordinara. Kiel postvenonto de tiom glora patro, li estis edukita laŭ la tre severaj principoj de sia severa naskiginto. Ekde siaj infanaj jaroj li al kutimiĝis al la uzado de la armiloj kaj lernis ĉion pri la strategia arto. Li havis ĉiujn meritojn de viro vere nobla, tamen, laŭ la karaktero li estis modesta, kvieta, silentema, tute ne elmontriĝema. Li estis tia, tamen li ne sciis kio estas timo, kio estas hezito, deflankiĝo, retreto, malsukceso; do, li estis temerara, li estis militisto nevenkebla, batalanto nerezistebila. Helpis eble je tio ankaŭ la fakto ke Ajakso estis viro alt-statura, grand-korpa, eksterordinare forta, preskaŭ ŝtala. Li batalis tenante

kun nekredibla facileco grandegan ŝildon faritan el sep ledoj de grand-korpaj taŭroj, kovritaj per peza tavolo da kupro. La ŝildo de Ajakso estis tiom peza, ke kvar ordinaraj viroj kune ne povis ĝin levi. Same peza estis lia grandega, terura glavo. Tiu, do, Ajakso estis la estro de la ameo de la Salamisanoj, armeo malmultenombra, sed vere terura, tre danĝera por la kontraŭuloj.



Dua estro de tiu armeo estis la dua filo de Telamono, la sufiĉe pli juna frato de Ajakso, Teŭkro. Tiu Teŭkro estis kompreneble, la plej intima amiko kaj la plej varma admiranto de sia glora frato. Li ne estis same forta kaj militkapabla kiel Ajakso, tamen li estis same kuraĝa kaj, krome, tre lerta, la plej lerta arkisto de la tuta helena armeo. En la bataloj Teŭkro precipe uzis sian pafarkon, do, li postis malpezan armilaron kaj pro tio li ordinaro batalis, starante apud sia frato, ofte malantaŭ ties sekura ŝildo. Tiu kutimo de Teŭkro iĝis tre efika, preskaŭ ĉiam sukcesa batalmetodo de la Salamisanoj. La tre bone trajnitaj de Teŭkro ark-pafistoj eniĝis en la batalo sin kaŝante po unu malantaŭ la peze armitaj viroj de Ajakso. Kiam la malamiko estis proksime kaj kiam ili entreprenis frontan atakon, la rapidmovaj arkistoj elĵetiĝis kaj fulme kuris ambaŭflanken de la kontraŭuloj, senĉese pafante kontraŭ ili per pluvo da sagoj. Tia fulm-rapida atako kaŭzis konfuzon al la kontraŭuloj, kiuj, klopodante sin ŝirmi de la flankaj pafoj, perdis sian kunteniĝon, ili iagrade disiĝis kaj tiam la peze armitaj viroj de Ajakso sturmis ilin.

Ajakso, grandiĝinte sub la tre severa gvidado de lia glora patro, interalie bone lernis respekti la pli maljunajn kaj pli spertajn kamaradojn kaj kompreneble, obei la komunajn decidojn de la supera konsilio de la armeestroj, kiun li plenrajte partoprenis. Mi jam diris ke li estis modesta, malalt-tona, tamen li estis viro fiero, li ne fanfaronis, sed li bone sciis kion li meritas, kion liaj kunmilitantoj ŝuldas al li; kaj tio, ĉar, en ĉiuj krizaj momentoj de la mult-jara milito, Ajakso estis tiu, kiu oferis la pli multon, tiu kiu mult-foje savis la helenan armeon de grandaj damaĝoj. Li bone sciis, ke li estas la plej sentima, plej forta, plej lerta kaj kapabla militisto de la helena flanko, li akceptis, ke nur unu viro povus esti komparata kun li, ke nur tiu unu viro, la granda nevudebla heroo, Aĥilo (Αχιλλεύς), filo de diino, povus eble elmontriĝi supera al li.

Estas sennombraj la militaj sukcesoj, la bravaĵoj kaj heroaĵoj de Ajakso, mi emfaze notas tion, ke, kiam la granda heroo, la terura Hektoro (Εκτωρ), la unua

filo de la troja reĝo Priamo (Πρίαμος) kaj estro de la tuta troja armeo, provokis en duelo ĉiun ajn helenan armeestron, nur naŭ bravaj viroj sin oferis alfronti la plej teruran kontraŭulon, tamen Ajakso estas tiu, kiu persiste postulis kaj prave ricevis la permeson reprezenti la tutan helenan armeon kaj protekti ties honoron.

La salamisa heroo por la unua fojo staris antaŭ kontraŭulo same forta, same kapabla, sentima, fiera, majesta, kaj la interbatalo estis ekstreme violenta. La kontraŭuloj batalis de malproksime per lanĉoj, de proksime per glavoj, per ŝtonoj, per pugnoj, per ĉio ajn kaj la kolizio estis kruela kaj longa. Ajakso trifoje sukcesis faligi sian kontraŭulon surteren, tamen la definitivan baton li ne sukcesis doni al li. Ĉar la duelo daŭris tre longe, kaj ĉar en ambaŭ flankoj la respondaj militestroj komprenis ke estus granda damaĝo la perdo de unu el tiaj herooj en duelo, per heroldoj interkonsentis kaj ĉesigis la batalon. Ajakso ne venkis, tamen ĉiuj, liaj amikoj kaj malamikoj, bone sciis ke neniu alia viro povus stari sur tiu bataltereno, ĉiuj bone sciis kio ekzakte estas heroo, kio ekzakte estas Ajakso.

En la daŭro de la longa milito, la famo de la batalforto de Ajakso estis tia, ke nur la apero de la salamisa heroo en batalo sufiĉis por dispeli la malamikojn. Tamen, la kulminon de sia gloro Ajakso atingis la plej krizan tagon, la plej fatalan por la helena flanko momenton de la longa milito. Estis tiam, kiam sago de Pariso (Πάρις), kvazaŭ miracle, trafis la kalkanon, la solan vundeblan korpopunkton de la granda heroo, de la dinaskita Aĥilo. La enorma korpo de la brila viro en nur unu momento ekfalas senspira, la majesta turo de la helena armeo disfalis, diseriĝis kaj tio okazis tre proksime al la troja murego. Por momento, ĉio, kvazaŭ la tuta naturo, silentis, sed tuj eksplodis freneze la ĝojokrioj de la Trojanoj, la vekrioj de la Mirmidonoj (Μυρμιδόνες), la kunuloj de la falinta heroo. Ajakso estis sufiĉe malproksime, tamen, la subita renverso de la normala stato en la medio de la tuta grandega bataltereno, mirakle konceptita de la helenaj estroj, subite skuegis, forte ekpuŝis lin kaj Ajakso, eligante sian sovaĝan batal-krion, fulme kuris. Li atingis la lokon de la terura okazo la momenton, kiam svarmo da ekscitiĝintaj Trojanoj, kolektiĝinte ĉirkaŭ la mortinto, interpuŝiĝis dezirante vidi, ĝui la gloran momenton. Kelkaj estis jam ligintaj per rimenoj la piedojn de la valora kadavro, ili estis pretaj treni ĝin en la urbon, celante malarmi kaj forĵeti ĝin al la hundoj. Ajakso, kvazaŭ subita tempesto, falis sur ilin; lia terura glavo, liaj ŝtalaj pugnoj, lia tuta superhoma forto ekdispuŝis, dispelis kvazaŭ muŝojn la surprizitajn kontraŭulojn, kiuj, tamen, tuj poste ĉirkaŭis lin kaj

amase lin atakadis sovaĝe. Tamen, ĉiu glavbato de Ajakso mortigis ne nur unu, sed multajn kontraŭbatalantojn. Malgraŭ la febro de la kruela batalo, malgraŭ la nepriskribebla tumulto, la atento de Ajakso restis koncentrita sur la sankta kadavro, kiun li ja sukcesis atingi, kiun li sukcesis levi sur siajn fortajn ŝultrojn, kaj, furioze batalante, lasante post si



sennombrajn mortajn malamikojn, kunporti ĝin al la sekureco de la helenaj vicoj. Ajakso ne lasis la malamikojn senarmigi kaj malhonorigi la plej amatan mortinton, li ne permesis al la kontraŭuloj ofendi la sanktan

kadavron, li savis ĝin kaj li savis la reputacion kaj honoron de la tuta helena armeo. Li ne aŭdis la vivuojn kaj gratul-kriojn de la kamaradoj, li liveris la mortinton al la Mirmidonoj kaj detiriĝis en sia kampadejo, kie li sin lasis al la flegado de tiuj kiuj zorgis pri la kuracado de liaj sennombraj vundoj.

Aĥilo estis solene enterigita, laŭ ritoj kaj honoroj decaj al la plej granda heroo kaj post tio, laŭ la deziro de lia patrino, la konsilio de la armeestroj decidis honore aljuĝi la armilaron de la mortinto, kiel premion, al tiu el la militistoj, kiu, laŭ la opinio de la plimulto estas inda je tia honoro, pro sia tuta ofero dum la ĝistiama daŭro de la milito. Ĉiuj sciis, ke la honoron meritas nur unu viro, la plej inda je la mortinta heroo, la modesta, plej forta, plej kapabla kaj plej valora helena batalanto, Ajakso.

Tio estas ja tute ĝusta, tamen, ni devas ne forgesi, ke la virto kaj la moralo, same kiel la beleco, tiras ne nur la admiron de la homoj sed ankaŭ la envion. Ŝajnas, ke tio puŝis la armeestrojn decidi tute maljuste kaj aljuĝi la grandan honoron al Odiseo (Οδυσσεύς), la plej inteligenta, sprita, ruza kaj artifikema armeestro, kiu, tamen, ne povus esti komparata kun Ajakso laŭ la forto kaj militkapablo.

Ajakso diris nenion, sed en li, subite, sed radikale, ĉio ŝanĝiĝis, en lia ĉasta animo estis perturbo, estis malordo nekonata. La unua lia penso estis, ke li devas defendi sian honoron, ke li devas preni la glavon, tuj mortigi, tute neniigi la abomenajn ofendintojn, tamen io lin retenis. Li restis tute sola, silenta en sia restejo, li estis dum la tuta tago en

senfina, kruela, interna batalo, kaj, la nokton, li definitive decidis puni siajn ofendintojn. Li surportis sian tutan pezan armilaron kaj ekiris!

Tamen, ĉio tio ĉi estis komplika, tute nedeca al la simplanima viro, lian menson kovris ia nebulo, estis konfuzo en lia cerbo, estis malklareco, kaj Ajakso direktiĝis al la brutobredejo, li staris antaŭ la brutoj, antaŭ la malamindaj armeestroj, li levis la teruran glavon, li sin ĵetis kontraŭ la ofendintojn, kontraŭ la brutojn kaj komencis ilin ekstermi!

Jes, Ajakso estis freneza! Lia naiva, tute senruza, simpla naturo ne povis elteni tian ekan ŝanĝiĝon. Tiun fojon batis lin ne ordinara kontraŭulo, estis ne ordinara minaco, estis io tute nova, estis komplikajo, kiun la simplanima Ajakso ne povis kompreni.

Li batalis longe, li mortigis Agamemnonon (Αγαμέμνων), Menelaon (Μενέλαος), Nestoron (Νέστωρ), Diomedon (Διομήδης), Odiseon, li mortigis ĉiujn kaj poste li restis longe sola sur la lasta sia bataltereno.

Kiam mateniĝis, kiam la krepusko etendis ĉirkaŭen sian hezitan duonlumon, kune kun la nigro de la nokto, iom-post-iome maldensiĝis ankaŭ la nebulo en la cerbo de Ajakso. Li rekonsciiĝis kaj surprizite vidis ĉirkaŭe la buĉitajn bestojn, li vidis klare, li komprenis, li plu sciis, ke ĉio estas finita, li sciis, ke, post tio, li estos ridinda, malŝatinda, senhonorigita, porĉiame makulita.

La temerara heroo ne povis tion elteni, li elteris por la lasta fojo sian glavon, li apogis, firme li starigis ĝin vertikale, kaj, poste, per sia tuta pezo li sin ĵetis kontraŭ ĝin! La dika ŝtala klingo trapasis la fortan bruston de la nevenkebla militisto, Ajakso mortis!

Sekvis ĉio atendita, rikanoj, ridaĉoj, moko; la kaŝita envio de multaj malkuraĝuloj povis nun libere malkovriĝi, la terura viro ne plu estis danĝera. En la konsilio de la armeestroj regis konfuzo, perplekseco, malĝojo; ĉiuj sentis turmente la konscienc-riproĉon kiu pezis sur ili, tamen ili povis nenion korekti. Ili devis konservi la konkordon kaj la disciplinon en la armeo, do, ili devis esti decidemaj kaj severaj. La lasta ago de Ajakso estis ŝoka, tute kontraŭa al la komprenmaniero de la krudaj militistoj, ili, do, ankoraŭfoje decidis maljuste, ili ne aranĝis decan al heroo armeestro sepultadon, ili ne bruligis la kadavron, ili ne starigis kairnon, ili enterigis ĝin eksterrite, en fora loko.

Teŭkro kaj la Salamisanoj, perdinte sian amatan estron kaj kunulon perdis ĉion. Ili unue organizis sian apartan laŭritan funebnon kaj lamentadon, ili oferis al la perdita granda heroo ĉian honoron decan al li kaj tuj poste ili enŝipiĝis kaj foriris de Trojlando, espriminte parole kaj fare sian malestimon kaj abomenon al la



maljustaj ofendintoj de la salamisa armeo.

Ajakso ne tute mankis al la Salamisanoj, ĉar kune kun ili vojaĝis la filo de ilia estro. Estis Eŭrisako (Ευρυσάκης), malgranda knabo, la sola infano de Ajakso, akirita en Trojo el Tekmesa (Τεκμήσσα). Tiu Tekmesa estis nobelino, filino de la reĝo de Frigio (Φρυγία) Teŭtraso (Τεύθρας) kaj ŝi estis kaptita en sturmo de la Helenoj kaj aljuĝita al la salamisa armeestro, kies ŝi estis kvazaŭedzino jam dek jarojn.

Dume, en Salamiso, Telamono, jam tre maljuna, izolite vivante en sia malgranda insulo, ne plu havante oftajn kontaktojn kaj komunikojn kun aliaj helenaj suverenoj, atendis senpacience informojn pri siaj du filoj kaj la salamisa armeo. Unu matenon, tute ne atendite atingis la maljunulon la agrabla informo, ke ŝipoj el la salamisa floto proksimiĝas al la insulo. Telamono ne povis resti en sia palaco; portante siajn plej brilajn ceremoniajn vestojn kaj sian tutan armilaron li iris al la haveno. Tie oni starigis la reĝan tronon, sur kiu sidis la respektinda mastro kaj atendis la alvenon de la gloraj liaj filoj.

La unuaj ŝipoj albordiĝis, ankriĝis kaj, tute sola, eliris unue Teŭkro. Li aliris al sia patro, tute silente li kliniĝis antaŭ li, li kiŝis lian manon kaj poste li reeniris en sia ŝipo, el kiu li eliris, pene tenante la pezan kirason kaj la grandegan glavon de Ajakso, kiujn li lasis ĉe la piedoj de sia maljuna patro. Ĉio estis dirita, la fulmo batis la majestan reĝon, la plej forta doloro skuegis lian maljunan koron, tamen li montris nenion; li longe silentis kaj kune kun li silentis ĉiuj nobeloj, la elŝipiĝintaj armeanoj, la tuta popolo kolektiĝinta ĉirkaŭ la reĝa trono.

Iom pli poste, Teŭkro komencis rakonti al sia patro ĉion ajn pri la sukcesoj de la salamisa armeo, pri la venkaj bataloj, pri la malfacile priskribeblaj militaj sukcesoj de Ajakso, pri la tre famaj grandaj herooj, kiuj falis de ties glavo, fine li rakontis ĉion pri la lasta akto, pri la konduto de la helenaj estroj, pri la fino de Ajakso. Telamono aŭdis ĉion silente kaj lia tuta doloro

iom-post-iome iĝis granda kolero, kolero direktita al Teŭkro. La forte ŝokita kaj vundita, la ĉiam, laŭnature rigida maljunulo komencis severe insulti kaj akuzi sian filon, ĉar li ne intervenis, ĉar li ne defendis sian fraton, ĉar li lasis lin fari tion kion li faris, ĉar li ne venĝis, ĉar li ne kunportis la kadavron de sia frato, ĉar, ĉar, ĉar... Teŭkro klopodis respondi, ekspliki, klarigi, tamen vane, Telamono, perdinte la sinretenon, kondutis pli kaj pli absurde, preskaŭ freneze. Fine, li postulis ke oni tuj prezentu al li lian nepon. Teŭkro eksplikis, ke, sekvante la regulojn pri la viv-protektado de la samtempe vojaĝantaj kron-princoj, li metis la infanon en alia ŝipo, kaj li komisiis ties prizorgon kaj protektadon al la unua genepalo de la armeo. Li rakontis, ke, pro malfacilaj veteraj cirkonstancoj, la floto disiĝis kaj la lastaj ŝipoj alvenos iom pli poste.

Ŝajnas ke Telamono, en sia indigno kaj konfuzo, suspektis, ke Teŭkro intence faris ĉion, intence ne defendis sian fraton, ne militis kontraŭ ĉiuj helenaj militestroj, li suspektis ke li mortigis la filon de Ajakso, por ne perdi la tronon de Salamiso, do, lia findecido estis terura. Li ordonis Teŭkron tuj kaj por ĉiam foriri de la lando. Ne nur Teŭkro, sed multaj personoj, alt-rangaj oficiroj, konsilantoj, fideluloj, popolanoj, klopodis ŝanĝi la absurdan reĝan decidon, la maljustan kondamnon de la senkulpa reĝido, ĉio estis vana, kaj ĉiuj sciis ke la decido de la rigora reĝo estas leĝo nemalobeebla!

La maljunulo enŝlosiĝis en sia palaco kaj Teŭkro provizis kelkajn ŝipojn per ĉio necesa kaj akompanate de siaj plej fidelaj kunuloj kaj intimaj amikoj foriris de Salamiso, irante al lokoj nekonataj kaj serĉante pri nova patrujo.

La vero estas, ke li ne foriris tuje. Iom malproksime de la insulo, marmeze, li mallevis la velojn, li haltis. Li atendis tie, ĝis kiam li vidis de malproksime, ke ankaŭ la lastaj ŝipoj de la salamisa floto, eĉ tiu de lia nevo, eniĝis en la havenon. Tiam, sciante ke li tute plenumis sian devon al sia perdita frato, levis la ankojn, li foriris.

Teŭkro longe vagadis en Mediteraneo (Μεσόγειος) ĝis kiam li atingis la orientan bordon de Cipro (Κύπρος), kie li definitive haltis. Tie li fondis civiton, kiu, en la daŭro de la tempo, prosperis. Post kelka tempo li edziĝis kun filino de unu el la plej potencaj reĝoj de Cipro kaj vivis pace, feliĉe, longe.

Kaj ĉar en ĉiu mito estas kaŝita ioma realo, mi diru, ke sur la orienta bordo de Cipro, vid-al-vide al Sirio, estas tre antikva urbo, kun longa, interesa historio, nomata Salamiso, kaj tio montras, ke ĝi estis fondita de Salamisanoj. Ĉu de nia Teukro, ĉu de aliaj, tute ne gravas, ni preferu limigi nin en la vere plej alloga kampo, en tiu de la mito.

Por tute kompletigi la rakontadon, mi aldonu, ke Teŭkro neniam revenis al sia naskiĝlando, en kiu, post la morto de Telamono, reĝo iĝis Eŭrisako, la filo de Ajakso.

La historio de la herooj de tiu ĉi rakontado, vekis la intereson de multaj brilaj, ĉiaspecaj artistoj de ĉiuj epokoj. La senmortaj plej elstaraj antikvaj, helenaj kaj romiaj poetoj kaj tragediverkistoj postlasis verkojn mirindajn, inter kiuj aparte distingiĝas la majstraĵo de la helena tragediisto Sofoklo (Σοφοκλής), "Ajakso". Aparte notinda estas ankaŭ la tragedio "Teucer", priskribanta la aventurojn de Teŭkro, verko de la granda romia verkisto Pakubio (Πακούβιος). La nomo de Ajakso estas pli multe ol ĉiuj aliaj mitaj kaj historiaj nomoj uzita, kiel nomo de societoj, entreprenoj, asocioj k.a. Kaj krom la multaj grekaj atletaj asocioj, ankaŭ tre granda nederlanda futbala teamo - feliĉe tre forta kaj tutmonde konata - havas la nomon de la granda heroo!

Teŭkro ne havis la saman sorton, tamen li porĉiame estos sur la ĉielo, kiel asteroido (Teucer 2797)

verkis **Spiros Sarafian** el Grekujo
(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

Kalocsay – la klara fonto de la esperanta literaturo

Antaŭ pli ol kvar jardekoj al nia granda literaturisto kaj vortaristo Gaston Waringhien oni demandis en intervjuo: “Se la tuta originala literaturo de Esperanto estus detruenda kaj vi rajtus savi unu solan titolon, kiun vi elektus?” la demandito respondis: Streĉita kordo de Kalocsay. Antaŭ kvin jardekoj William Auld, jam tiam fama poeto en Esperanto, skribis sur la titolan paĝon de ekzemplero de tiu sama libro, donacita al mi: “Jen la klara fonto!”



Nu ja, feliĉe, la literaturo de Esperanto de tiam daŭrigis sian vojon, novaj gravaj verkoj aperis, novaj talentaj verkistoj konstante kontribuas al la evoluo de nia literaturo. Tamen, ne nur la menciita poemaro de Kalocsay, aperinta antaŭ pli ol sep jardekoj, sed ankaŭ lia tuta ampleksa verkaro, originala kaj tradukita, daŭre restas inter la plej gravaj atingoj sur la kampo de la Esperanta literaturo.

Kálmán Kalocsay estis hungaro, medicinisto, ĉefkuracisto en Budapeŝta hospitalo. Li konatiĝis kun Esperanto en 1911 kaj debutis kiel poeto en 1921 per malgranda poemaro, Mondo kaj koro. Ekde tiam komencis funkcii lia rolo kiel ĉefa evoluiganto de la Esperanta poezio, ĝiaj verstekniko kaj esprimopovoj, en la intermilitaj jaroj.

Sed, efektive, la Kaloĉaja fenomeno estas tiom granda, ke oni prefere parolu pri roloj ol rolo. Unue, Kalocsay elstaris kiel originala lirikisto, kie pintas la jam menciita poemlibro Streĉita kordo (1931). Due, li estis tradukisto de artaj ĉefverkoj: La tragedio de l' homo de la hungara poeto Madách [madaĉ], de Infero de Dante, de tri dramoj de Shakespeare, de poemoj de Baudelaire, Heine kaj Petőfi, por menciigi la plej gravajn el la vasta kvanto de liaj tradukaĵoj. Kaj trie li eminentis ankaŭ sur la prilingva kampo, kie lia laboro kulminis en la tria parto de la fama Plena Analiza Gramatiko de Esperanto. Krome, dum ĉiuj tri periodoj, li estis la motoro de la grava revuo Literatura Mondo.

La verkaro de Kálmán Kalocsay ampleksas 37 librojn, 7 poeziajn originalojn, 19 tradukojn kaj 11 lingvajn studojn. Kelkaj el tiuj verkoj estis farataj kunlabore kun aliaj, ekzemple kun Waringhien en la verkoj Plena Gramatiko, Parnasa Gvidlibro, La Floroj

de l' Malbono de Baudelaire kaj Kantoj kaj Romancoj de Heine.

Kiel poeto Kalocsay estis admiranto de klasikaj modeloj kaj fiksitaj verso-formoj. Tion plej klare atestas lia versita traktaĵo La Arto Poetika en Parnasa Gvidlibro. Li agnoskis, ke li sentis sin fremda al la moderna poezio, “kiu parolas malpli al la intelekto ol al aliaj sferoj” kiel li skribis al mi siatempe. Tamen, kompreneble, tio ne signifas, ke la originala poezio de Kalocsay estas manka je emociaj tonoj. Lia poemo En amara horo estas unu el la plej sinceraj kaj belaj poemoj en la lingvo. En tiu poemo la poeto korŝire plendas pro nekomprenemo kaj manko de subteno fare de la ĝenerala esperantistaro, li sentas sian solecan pozicion: “Ho, kie estas la konsolo ! Por mi – poeto sen popolo!” Sed la lingvo mem, kiun li amas, lin savas:

*Ho, jen vi, Esperanto! Ne glora kaj fiera,
Nur orfa, senpotenca, senforta, senmatura,
Svenema kaj senhelpa kaj – eble – senespera,
Sed nobla, blanka, klara kaj senmakule pura.*

Tra sia tuta vivo, kiel sindediĉa esperantisto, Kalocsay plenumis siajn diversajn rolojn kaj kiel senlaca kultivanto de la Esperanta literaturo kaj instiganto al ties pluportantoj. Li direktis ĝian evoluon al ambiciaj altoj kaj pli ol iu alia Esperanto-verkisto kreis fidon kaj konvinkon pri la kapabloj de la lingvo atingi plenan egalrajton kun la grandaj literaturaj lingvoj.

Sen la unika laborado de Kálmán Kalocsay nia literaturo supozeble ne havus tian kulturalan statuson, kian ĝi havas nun.

de **Baldur Ragnarsson**


(Juna amiko)

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/kalocsay.html>

Kion vi farus?

-- amuze rakontas Maurizio Brucco el Britio

Karaj geamikoj, imagu belan sunan tagon. Ni supozu ke vi rapide veturas hejmen per via aŭtomobilo. Subite, neatendite, vi ekrimarkas, ke la bremsoj de via aŭto ne plu funkcias, kaj, antaŭ vi estas vojforko.



En la dekstra flanko estas ulo kiu flue parolas Idon. Li verkos gravan novelon en tiu lingvo, kio sukcese pliigos la nombron de ĝia parolantoj.

Male, en la maldekstra flanko, estas kora, simpatia, agrabla bovino, kies lakto estas la ununura enspezofonto de ĝentila familio de esperantistoj.

Se vi turniĝus dekstren, vi mortigus la ulon, maldekstren vi murdus bovinon. Vi ne havas alian alternativon. Kion vi farus? kiu estus via elekto?

DU BARELOJ

fablo de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

Veturis la Barel' kun vin',
En la alia —
Enhav' nenia.
La vin-barel' sen bru' kaj ne urĝante sin,
Veturis,
Sed en galop' alia kuris.
Pro ĝi sur la pavim' — tondrego kaj frapad',
Kaj polvo en kaskad'.
Pasanto en konfuz' al flanko sin sekuris,
Aŭdinte bruon en la strat',
Sed malgraŭ bruo de Barel'
Utilo ĝia estis bagatel'.
Reklamas sin vantulo sen modero,
Sed tre modestas li en la afero.
La granda hom' modestas en parol'
Kaj grandas en aferoj por popol'.
Laboras li persiste, en trankvilo
Kaj sen babilo.



verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)
Ukrainio

Amuza Matematiko

-- tradukis kaj sendis Bardhyl Selimi el Albanio

Kiom da poŝtkartoj?

Grupo de amikoj interŝanĝis poŝtkartojn.
Ĉiu sendis po unu poŝtkarton al la ceteruloj.
Tiucele oni aĉetis 992 poŝtkartojn entute.
Kiom da amikoj estis?

Pruvo

$$32 \times 31 = 992$$



Solvo

Ni formas ekvacion $x(x-1) = 992$ kies pozitiva radikoj estas 32.

Rezulto

La nombro de amikoj estas 32.

Franco KAFKO (Franz Kafka) *
La transformiĝo (parto 6)
(daŭrigata)



Dum la unuaj du semajnoj la gepatroj ne povis preni sur sin eniri al li, kaj li ofte aŭdis, kiel ili plene agnoskis la nunan laboron de la fratino, dum ĝis tiam ili ofte koleris pri la fratino, ĉar ŝi ŝajnis al ili iom senutila knabino. Sed nun ofte ambaŭ, la patro kaj la patrino, atendis antaŭ la Gregora ĉambro, dum la fratino tie ordigis, kaj apenaŭ ŝi estis elirinta, ŝi devis tute detale rakonti, kiel aspektas en la ĉambro, kion Gregoro estas manĝinta, kiel li tiufoje kondukis kaj ĉu eble rimarkeblas eta pliboniĝo. La patrino cetere volis relative baldaŭ viziti Gregoron, sed la patro kaj la fratino retenis ŝin unue per raciaj argumentoj, kiujn Gregoro tre atente aŭskultis, kaj kiujn li plene aprobis. Sed pli malfrue oni devis reteni ŝin perforte, kaj kiam ŝi tiam kriis: "Lasu min do al Gregoro, li estas ja mia malfeliĉa filo! Ĉu vi do ne komprenas, ke mi devas iri al li?", tiam pensis Gregoro, ke eble tamen estus bone, se envenus la patrino, ne ĉiutage kompreneble, sed eble unufoje semajne; ŝi komprenis ja ĉion pli bone ol la fratino, kiu malgraŭ sia kuraĝo estis tamen nur infano kaj lastkiale eble nur por infana facilanimeco transpreninta tiom malfacilan taskon.

La deziro de Gregoro, vidi la patrinon, baldaŭ plenumiĝis. Dumtage Gregoro jam pro konsidero al siaj gepatroj ne volis sin montri ĉe la fenestro, sed multe krabli sur la malmultaj kvadrataj metroj de la planko li ankaŭ ne povis, la senmovan kuŝadon li jam dumnokte malfacile eltenis, la manĝo baldaŭ ne plu faris al li la plej etan plezuron, kaj tiel, por distriĝo, li alprenis la kutimon krabli ĉiudirekte sur vandoj kaj plafono. Li aparte ŝatis pendi supre ĉe la plafono; estis tute alie ol la kuŝado surplanka; oni spiris pli libere; ioma svingado trairis la korpon; kaj en la preskaŭ feliĉa distriteco, en kiu Gregoro tie alte troviĝis, povis okazi, ke li, je sia propra surprizo, sin delasis kaj klakis sur la plankon. Sed nun li kompreneble regis sian korpon tute alie ol antaŭe kaj ne damaĝis sin eĉ ĉe tiom granda falo. La fratino tuj rimarkis la novan distraĵon, kiun Gregoro estis por si trovinta - li postlasis krablante ja ankaŭ ie kaj tie spurojn de sia gluo -, kaj ŝi havis la ideon ebligi al Gregoro la krabladon en pli vasta skalo kaj forigi la

meblojn, kiuj malebligis tion, do precipe la ŝrankon kaj la skribtablon. Sed ŝi ja ne estis kapabla fari tion tute sola; la patron ŝi ne kuraĝis peti pri helpo; la servistino tute certe ne helpus ŝin, ĉar tiu proksimume deksesjara knabino ja certe brave persistis de post la maldungo de la antaŭa kuiristino, sed estis petinta kiel favoraĵon la rajton teni la kuirejon senĉese ŝlosita kaj devi ĝin malfermi nur laŭ speciala alvoko; tiel restis al la fratino do nenio alia ol foje dum la foresto de la patro venigi la patrinon. Kun ekkrioj de ekscita ĝojo la patrino ankaŭ alvenis, sed mutiĝis ĉe la pordo de la Gregora ĉambro. unue la fratino kompreneble kontrolis, ĉu en la ĉambro ĉio estis en ordo; nur poste ŝi lasis la patrinon eniri. Gregoro plej urĝe tiris la toltukon ankoraŭ pli malsupren kaj en faldojn, la tuto aspektis vere nur kiel hazarde super la kanapon ĵetita toltuko. Gregoro ankaŭ ĉi-foje detenis sin spioni sub la toltuko; li rezignis pri tio, vidi la patrinon jam ĉi-foje, kaj nur estis feliĉa, ke ŝi nun tamen estis veninta. "Venu nur, oni ne vidas lin", diris la fratino, kaj evidente ŝi gvidis la patrinon ĉe la mano. Gregoro aŭdis nun, kiel la du malfortaj virinoj movis la iom pezan malnovan ŝrankon de ĝia loko kaj kiel la fratino senĉese postulis la plej grandan parton de la laboro por si, sen aŭskulti la avertojn de la patrino timanta, ke ŝi trostreĉiĝas. Tio daŭris tre longe. Eble post jam kvaronhora laboro diris la patrino, ke oni do lasu la ŝrankon prefere tie, ĉar unue ĝi estas tro peza, ili ne finfaros antaŭ la alveno de la patro kaj per la ŝranko meze de la ĉambro baros al Gregoro ĉian vojon, sed due ja tute ne estas certe, ke per la forigo de la mebloj oni faras servon al Gregoro. La malo ŝajnas al ŝi vera; la aspekto de la malplena muro ĝuste premas al ŝi la koron; kaj kial ne ankaŭ Gregoro havu tiun senton, ĉar li ja estas delonge kutiminta al la ĉambromebloj kaj pro tio sentus sin forlasita en la malplena ĉambro. "Kaj ĉu ne estas tiel", finis la patrino tute mallaŭte, kiel ŝi entute preskaŭ flustris, kvazaŭ ŝi volus eviti, ke Gregoro, kies restejon ŝi ja ne konis, aŭdu eĉ nur la sonon voĉan, ĉar ke li ne komprenas la vortojn, pri tio ŝi estis konvinkita, "kaj ĉu ne estas tiel, kvazaŭ ni montrus, per la forigo de la mebloj, ke ni rezignas pri ĉia espero je resaniĝo kaj lasas lin senkonsidere al li mem? Mi pensas, ke estas plej bone, ke ni provas konservi la ĉambron en precize tiu stato, en kiu ĝi estis antaŭe, por ke Gregoro, kiam li revenos al ni, trovos ĉion senŝanĝa kaj tiom pli facile povos forgesi la intertempon."



Ĉe aŭskulto de tiuj vortoj de la patrino Gregoro perceptis, ke la manko de ĉia senpera homa alparolado, lige kun la monotona vivo meze de la familio, en la paso de tiuj du monatoj certe konfuzis lian racion, ĉar alie li ne povis al si klarigi, ke li serioze povis deziri, ke lia ĉambro estu malplenigita. Ĉu li vere havis emon ŝanĝigi la varman, per hereditaj mebloj hejmece provizitan ĉambron al kaverno, en kiu li tiam certe povus krabli ĉiudirekte kaj senĝene, sed ankaŭ en samtempa, rapida, totala forgeso de sia homa pasinteco? Jam nun li estis ja preskaŭ forgesanta, kaj nur la delonge ne aŭdita voĉo de la patrino elskuis lin. Nenio devis esti forigata; ĉio devis resti; la bonajn influojn de la mebloj sur sian staton li ne povis malhavi; kaj se la mebloj lin malhelpis daŭrigi la sensencan krabladon, tiam ne estis damaĝo, sed granda avantaĝo.

Sed la fratino havis bedaŭrinde alian opinion; ŝi estis kutiminta, kvankam ne tute malprave, dum diskuto pri la aferoj Gregoraj roli kiel aparte grava spertulino vidalvide la gepatroj, kaj tiel la konsilo de la patrino estis nun por la fratino sufiĉa kialo por insisti ne nur pri la forigo de la ŝranko kaj de la skribtablo, al kiuj solaj ŝi unue pensis, sed pri la forigo de la tuta meblaro, escepte de la nemalhavebla kanapo. Estis kompreneble ne nur infaneca spitemo kaj la dum la lasta tempo tiom malfacile akirita memfido, kiuj kondukis ŝin al tiu postulo; ŝi estis ja ankaŭ fakte observinta, ke Gregoro bezonis multe da spaco por krabli, sed male la meblojn, kiom oni povis vidi, neniom uzis. Sed eble kunludis rolon ankaŭ la entuziasma sento de la knabinoj ŝiaaĝaj, kiuj emas kontentiĝi je ĉia okazo, kaj de tio Greta nun lasis sin delogi, fari la situacion Gregoran ankoraŭ pli terura, por poste povi ankoraŭ pli servi al li ol ĝis nun. Ĉar en ĉambron, en kiu sole Gregoro regis super la malplenaj vandoj, kuraĝus eniri certe neniu homo krom Greta.

Kaj tiel ŝi ne lasis sin deturni de sia decido per la patrino, kiu krome en tiu ĉambro ŝajnis malcerta pro maltrankvilo, baldaŭ mutiĝis kaj laŭforte helpis la fratinnon eligi la ŝrankon. Nu, la ŝrankon Gregoro povis en ekstrema kazo ankoraŭ malhavi, sed jam la skribotablo devis resti. Kaj la virinoj apenaŭ forlasis la ĉambron kun la ŝranko, kontraŭ kiu ili sin anhelante premis, kiam Gregoro antaŭenpuŝis la kapon el sub la kanapo por vidi, kiel li povus prudente kaj kiel eble plej respekteme interveni. Sed malbonŝance revenis unue ĝuste la patrino, dum Greta en la antaŭĉambro sola ĉirkaŭtenis la ŝrankon kaj ĝin sole tien kaj reen ŝancelis, nature sen ĝin movi de la loko. Sed la patrino ne kutimis la aspekton de Gregoro, ĝi povus ŝin malsanigi, kaj tiel Gregoro rapidis timigite retropaŝe ĝis la alia flanko de la kanapo, sed ne povis malhelpi,

ke la toltuko antaŭe iom moviĝis. Tio sufiĉis por atentigi la patrinnon. Ŝi hezitis, staris momenton senmove kaj poste reiris al Greta.

Malgraŭ ke Gregoro diris al si ĉiam denove, ke okazas ja nenio eksterordinara, sed ke estas translokataj nur kelkaj mebloj, tamen, kiel li devis baldaŭ al si mem koncedi, tiu irado de la virinoj tien kaj reen, iliaj alvoketoj, la gratado de la mebloj sur la planko, efikis sur lin kvazaŭ granda, de ĉiuj flankoj nutrata tumulto, kaj kvankam li firme al si tiris kapon kaj gambojn kaj premis la ventron al la planko, li devis nepre al si diri, ke li ĉion ĉi ne longe eltenos. Ili malplenigis lian ĉambron; prenis ĉion, kio estis al li kara; la ŝrankon, en kiu kuŝis la arabestosegilo kaj aliaj iloj, ili jam estis elportintaj; malfiksis nun la jam en la planko firme enfosiĝintan skribotablon, ĉe kiu li kiel komercakademiano, kiel mezlernejo, ja eĉ jam kiel ano de la elementa lernejo skribis siajn taskojn, - tiam li vere ne plu havis tempon por kontroli la bonajn intencojn, kiujn havis la du virinoj, kies ekziston li cetere preskaŭ forgesis, ĉar pro elĉerpiĝo ili laboris jam mute, kaj oni aŭdis nur la pezan paŝadon de iliaj piedoj.

Kaj tiel li elfjetis sin - la virinoj dume apogis sin en la apuda ĉambro je la skribotablo por iom retrovi la spiron -, ŝanĝis kvarfoje la kuran direkton, li vere ne sciis, kion li savu unue, tiam li vidis okulfrape pendi ĉe la cetere jam malplena vando la bildon de la sinjorino vestita tute en peltaĵo, urĝe krablis supren kaj premis sin al la vitro, kiu tenis lin kaj bonfartigis al lia varmega ventro. Almenaŭ tiun bildon, kiun Gregoro nun ĉiom kovris, nun estis certe neniu forprenonta. Li turnis la kapon al la salona pordo por observi la virinojn ĉe ilia reveno.

Ili ne permesis al si multe da ripozo kaj jam revenis; Greta, la brakon ĉirkaŭ la patrinnon, ŝin preskaŭ portis. "Do kion ni prenu nun?" diris Greta kaj ĉirkaŭrigardis. Tiam ŝiaj rigardoj kruciĝis kun tiuj de Gregoro ĉe la vando. Supozeble nur pro la ĉeesto de la patrino ŝi gardis sian memregon, klinis sian vizaĝon al la patrino por tiun deteni de ĉirkaŭrigardo kaj diris, kvankam treme kaj senpripense: "Venu, ĉu ni prefere ne reiru ankoraŭ por momente en la salonon?" La intenco de Greta estis por Gregoro klara, ŝi volis eldanĝerigi la patrinnon kaj poste depeli lin de la vando. Nu, ŝi povis tion ja provi! Li sidis sur sia bildo ne eldononta ĝin. Prefere li saltus al Greta en la vizaĝon.

Sed la vortoj de Greta nur des pli maltrankviligis la patrinnon, ŝi paŝis flanken, rimarkis la brunan makulegon sur la florumita tapeto, kriis, antaŭ ol vere konsciiĝi ke estas Gregoro, kion ŝi vidis, per kianta, raŭka voĉo: "Ho dio, ho dio!" kaj falis kun etenditaj brakoj, kvazaŭ ŝi rezignus pri ĉio, laŭlonge sur la

>>20

ANTAŬ TRE LONGE

Antaŭ miloj da jaroj, kiam la historio de la homaro apenaŭ komenciĝis, la Teron vizitis aliplanedanoj, kiuj similis homojn. Iliaj korpoj estis ĉiam junaj kaj belaj, krom kiam ili intence volis igi sin aspekti kiel abomenindaj monstroj, por timigi la homojn. Ili nek maljuniĝis, nek malsaniĝis, nek sentis fizikajn dolorojn. Ili kapablis vojaĝi facile kaj rapide inter planedoj kaj galaksioj. En ilia komunumo, la nivelo de la scienco estis miloble pli alta ol la iama nivelo de la antikvaj homoj sur la Tero. El multaj vidpunktoj, iliaj sciencaj konoj kaj ilia teknologio ege surpasis eĉ niatempan kulturon. Iliaj karakteroj similis tiujn de la teranoj. Do, tiuj aliplanedanoj kapablis mensogi, envii, avari, ekkoleri, kalumnii, ŝteli, murdi ktp. Sed ili kapablis ankaŭ ami, kompati, entuziasmiĝi pri io bela, malavari, sincere amikumi, helpi, teni siajn promesojn ktp. La rilatoj inter tiuj aliplanedanoj kaj la antikvaj teranoj estis tre diversaj. La aliplanedanoj ofte uzis hipnozon, kiel metodon por influi homajn sentojn, pensojn kaj agadojn. Ŝajnas ke tamen ili ne povis uzi la saman metodon por influi unuj la aliajn, do ene de ilia komunumo aperis oftaj konfliktoj. Iliaj hipnoz-influoj estis kelkfoje bonefikaj, aliffoje malbonefikaj por la koncernaj homoj. La aliplanedanoj kapablis fariĝi nevideblaj per la homaj okuloj, kiam ajn ili deziris. Ili ankaŭ kapablis aliformiĝi en aliajn estaĵojn por atingi siajn celojn.

Ŝajnas ke nun, tiuj aliplanedanoj ne plu troviĝas sur la tero. Oni ne scias, ĉu ili forlasis nian planedon definitive. Eble parto el ili revenos aŭ jam revenis. Iuj supozas, ke ili eĉ ne foriris, sed decidis kaŝi sin pro diversaj kialoj... Cirkulas centoj da rakontoj pri tiuj aliplanedanoj kaj miloj da supozoj. La antikvaj homoj nomis ilin "dioj" kaj "diinoj" kaj dediĉis al ili belajn templojn, el kiuj multaj daŭre konserviĝas.

daŭrigata



EŬTERPO kaj TERPSIKORO

Du el la inspiristinoj ŝategis muzikumi kaj danci. Plej ofte ili instruis duope. Kvankam ambaŭ kapablis kaj muzikumi kaj danci, unu el ili preferis muzikon. Tiu ĉi kantadis, muzikludadis aŭ aŭskultis muzikon ĉiutage ekde vekiĝo ĝis enlitiĝo kun plezurego, tial oni nomis ŝin Eŭterpo ("La Muzikema"). La alian oni nomis Terpsikoro ("La Dancema"), ĉar ŝi prioritatis dancon. Eŭterpo helpis siajn lernantojn krei kantojn prezentablajn unuope aŭ korse. Terpsikoro elpensis diversajn ritmojn, paŝmanierojn kaj stilojn de movado, kiujn la lernantoj efektivigis unuope aŭ grupe.



Erato, Polimnio kaj Kaliopo bonvole helpis pliriĉigi iliajn muzikajn kaj dancajn kreaĵojn per artecaj vortoj, taŭgaj juveloj kaj vestaĵoj.

Tamen, kiam Zeŭso observis la agadojn de Eŭterpo kaj Terpsikoro, lia vizaĝo ombriĝis pro malkunsento...

TALIO kaj MELPOMENO

Alia duopo estis Talio ("La Floranta") kaj Melpomeno ("La Melodia"). Ili ĉiam bezonis unu la alian kaj helpis unu la alian.

Talio estis tiel nomata, ĉar ŝi aspektis ĉiam gaja kiel freŝa floro. Ŝi tre amis florojn, arbojn kaj grenojn, tial ŝi ofte inspiris siajn lernantojn pri agrikulturaj laboroj. Ŝia bonhumoro akompanis la homojn dum festoj dediĉitaj al semado aŭ rikoltado, samkiel dum festenoj planitaj okaze de gajaj eventoj, kiel ekzemple geedziĝoj aŭ naskiĝoj. El ĉiuj inspiristinoj, Talio posedis la plej multenombrajn kaj diversajn talentojn. Talio helpis la homaron irigi la grundon kaj obteni pli kaj pli multajn bongustajn kaj sanigajn fruktojn, legomojn kaj grenojn. Ŝi estis spertulo pri geometrio kaj arkitekturo, tial ŝia ĉeesto ĝojigis sciencistojn, inĝenierojn kaj laboristojn kiuj elpensis kaj realigis ŝoseojn, pontojn kaj domojn. Talio kutimis stimuli kaj la raciemon kaj la emociemon de la homoj. Ŝi estis ege

amata precipe pro tio, ke ŝi inspiris al siaj lernantoj la kapablon kompreni la ĝojojn de aliuloj, kune kun la deziro kundividi siajn ĝojojn. La homoj inspiritaj de Talio fariĝis ŝercemaj kaj gajaj, ĉiam pretaj igi aliulojn ridi aŭ rideti. La humuro kiun Talio inspiris estis bonintenca kaj saniga, tute senmalica.

Melpomeno ricevis tiun nomon, ĉar ŝi havis fascinan

voĉon, per kiu ŝi inspiris al la lernantoj la kapablon kompreni kaj kompati suferantajn aliulojn. La tristeco kiun ŝi inspiris, vekis en la homoj la deziron helpi la malfeliĉulojn aŭ almenaŭ kuraĝigi tiujn. Melpomeno ankaŭ ŝategis ludi liron kaj iuj eĉ supozas, ke estas ŝi kiu inventis tiun ĉarman muzikilon. Ŝiaj bonkoreco kaj kunsentemo akompanis la homojn dum ties tristaj momentoj, kiel ekzemple dum funebraj tagoj aŭ kiam okazis grandaj malfeliĉoj.

Talio kaj Melpomeno ŝategis aktoradon kaj deklamadon. Ili kutimis kunlabori kun Erato, Polimnio kaj Kaliopo. Nur imagu, kiom enuigaj estintus ajnaj beletraĵoj, kiuj nek vekus en vi senton de kompatato nek amuzus vin... Sen Talio, la vivo estintus griza kaj senĝoja, sed sen Melpomeno mankiĝus amo, do la tuta vivo estintus sensenca. La homaro bezonis ilin ambaŭ por akiri animan ekvilibron.

Talio kaj Melpomeno kunlaboris brile okaze de longaj spektakloj, kiuj okazis en belaj amfiteatroj. Por tiuj tre popularaj eventoj, Melpomeno inspiris tragediojn kaj Talio inspiris komediojn. La spektantoj aprezis tiujn spektaklojn kaj partoprenis ilin amase. Geniaj verkistoj prezentis siajn verkojn sur tiuj scenejoj. La publiko estis entuziasma, reagis kun granda intereso, ploris aŭ ridis kune kaj komentis kun pasio.

Malgraŭ tio, kiam Zeŭso observis la agadojn de Talio kaj Melpomeno, liaj okuloj malheliĝis pro malkontento...

URANIO kaj KLIO

Uranio ("La Ĉiela") kaj Klio ("La Raportema") estis inspiristinoj kiuj kompletiĝis unu la alian kaj multe dependis unu de la alia. Uranio kaj Klio, samkiel Talio, stimulis tre multe la racion de siaj lernantoj, dum la aliaj fratinoj stimulis precipe la emociojn kaj la sentojn.

Uranio ŝategis precipe okupiĝi pri astrologio kaj astronomio, tial ŝi ricevis sian nomon. Pere de astrologio, Uranio scipovis malkovri multajn sekretojn pri la estonteco. Ŝi kapablis antaŭvidi gravajn eventojn kaj konsili la homojn kiel agi por preventi malfeliĉojn aŭ por ne misitrafii siajn ŝancojn pri feliĉo. Nur al tre malmultaj speciale elektitaj lernantoj, ŝi konsentis inspiri la raran kapablon antaŭvidi la estonton. Tiu kapablo estis samtempe arto kaj scienco, kaj postulis apartan denaskan inklinon. Uranio ankaŭ inspiris siajn lernantojn malkovri leĝojn de matematiko, kemio kaj fiziko, por kompreni kiel moviĝas la planedoj kaj la steloj. La evoluo de la sciencoj helpis ankaŭ al la kreado de pli kaj pli belaj kaj fortaj konstruaĵoj. Interalie, oni konstruis amfiteatrojn por longaj teatro-spektakloj. La inspiristinoj ĉeestis naŭope tiajn

spektaklojn kaj priferis pri siaj lernantoj. La harmonia kunlaboro inter la naŭ instruistinoj, helpis la homojn aprezi la ekvilibron inter raciemo kaj emociemo. Ekzemple, homoj kutimiĝis admiri ne nur la fascinan belecon de la steloplana ĉielo, sed ankaŭ la perfektan kongruecon inter ĉiuj fizikaj leĝoj kiuj gvidas la stelojn kaj la planedojn. Tiel la teranoj komencis jam revii pri kosmaj vojaĝoj...


Klio, la plej aĝa el la naŭ fratinoj, inspiris al siaj lernantoj la kapablon esplori kaj kompreni la historion de la homaro, samkiel la kapablon priskribi la gravajn eventojn akurate, klare kaj fidele. Ŝi helpis siajn lernantojn selekti el inter multegaj ĉiutagaj eventoj ĝuste tiujn, kiuj vere gravas kaj indas esti menciitaj en historiaj libroj, por ke la sekvaj generacioj povu ekscii la veron pri la spertoj de siaj antaŭuloj. La historiaj verkoj inspiritaj de ŝi provis vekii en la animoj de la legantoj admiron kaj imitemon rilate al valoraj sciencaj kaj artaj realigoj aŭ al noblaj sociaj agadoj, kiuj estis okazintaj aŭ ĝuste okazantaj. Samtempe, ili vekis la kritikemon koncerne erarojn kiujn la homaro estis farinta aŭ faranta kaj la deziron neniam ripeti la samajn erarojn. Iom post iom, la eventoj kiujn la historiaj verkoj priskribis fariĝis famaj kaj la herooj okazigintaj tiujn eventojn fariĝis same famaj. La plej bonaj sciencistoj kaj artistoj kaj iliaj kreaĵoj fariĝis pli kaj pli bone konataj kaj multaj homoj volis imiti ilin. Honesteco estis la ĉefa virto kiun Klio fortigis en la homaj animoj. Onidire ŝi estis la plej filozofiema el la naŭ fratinoj, ĉar ŝi konis gravajn sekretojn pri la pasinteco, laŭ kiuj ŝi povis helpi la homaron modli sian estontecon.

Klio kaj Uranio kompletiĝis unu la alian: sen bona kompreno de la pasinteco, oni ne povas imagi la estontecon; sen ajna mensa imago pri la estonteco, oni ne povas kompreni la signifon de la pasintaj kaj de la nunaj historiaj eventoj.

Zeŭso observis la agadojn de Uranio kaj Klio, kaj liaj pugnoj streĉiĝis pro kolero...

(daŭrigota)

verkis kaj sendis **Luiza Carol** el Israelo



Erik Tantal

La Kimero

Rakonto el la estonteco

1-a Eldono 2020

Oni enplantis homajn fontoĉelojn [*] en genetike ŝanĝitajn bestajn embriojn. Tiuj ne plu kapablis produkti propran pankreaton. Tial ili devus uzi la disponitajn homajn fontoĉelojn por formi la mankantan organon.

Post maturiĝo oni disponus pri pankreato, taŭga kiel transplantajo por homo. Kaj verŝajne ne plu okazus danĝera depuŝado de la fremda organo. „Kial tio estus malĝusta interveno? Se tio funkcius, la daŭra manko de bezonataj organoj por transplantado malaperus, ĉu ne?“ Kun tiuj ideoj en la kapo Sven promenitis enpensigeme al la kafo-aŭtomato.

„Bonan matenon, Sven, kiel vi majstris la unuan tagon?“, demandis Volker. „Bone, sed multo vagadas tra mia kapo. Mi intertempe ne plu certas, ĉu tiu studfako vere estas ĝusta por mi“, respondis Sven. „Ĉu vi fantazias? Tuj post la komenco rezigni?“

Ni ja jam planis daŭrigi nian karieron en Tokio post kelkaj semestroj!“, skoldis lin Volker. „Ha, 'konnichiwa' [**], vi ja nur volas kuiru rizon kune kun Sakura“, ŝercis Sven. Ambaŭ studentoj hieraŭ konatiĝis kun Sakura dum la informaranĝo kaj esperis denove renkonti ŝin hodiaŭ matene ĉe la kafo-automato.

„Atentu, ŝi jam venis“, ĝojis Sven. Li tute mienis ridete. Volker tuj rapidegis al la kafo-aŭtomato. „Ĉu kun lakto aŭ sen lakto?“, li demandis kaj fiere servis la kafon al la beleta kunstudentino, kiu kompreneble ĝentile dankis. Volker ne povis eviti ĵeti triumfan rigardon al Sven. Li ja rimarkis ke Sven ankaŭ interesiĝis pri ŝi.

„Jes, nun ni estas triope. Eventuale ankoraŭ aliaj venos, sed ni povas jam komenci la diskutrondon. Kion vi pensas pri la informaranĝo hieraŭ?“, demandis Sven. Scivoleme li atendis la unuan diron. Li ne planis gvidi la rondon, sed ne tiom bone ekfunkciis la diskutado. Volker iomete konfuzite rigardis al Sakura kaj turnis sin al Sven. Sakura heziteme rimarkis: „Kion

Ideoj
Tuj post matenmanĝo Sven decidis denove tralabori la informojn pri la japana esplorprojekto. Tiam li volis profundigi la konversacion kun la kunstudentoj. Li ja komprenis, ke tiu projekto baziĝis sur tiu genia nova ideo:

vi pensas? Hieriaŭ ni ja ricevis bonajn informojn. Tamen ni ankoraŭ estas tro sensciaj. Mi proponas iom ĝisatendi la venontajn prelegojn kaj seminariojn.“

Sven bezonis ideon por ebligi konversacion pri la komuna studfako. Tial li ekrakontis pri sia hieraŭa sonĝo. „Ho ve, tio certe estis inkubo“, komentis Volker. Sed la pritakso de Sakura estis tute alia: „Mi ĝojas, ke la faritaĵoj de niaj famaj esploristoj povis tiom forte impresi vin. Mi mem normale havas aliajn sonĝojn.“ Dum tio ŝi ne povis subpremi ruzetan rideton. Sven postulis plian objektiveton kaj notis: „Jes, jes, sed pri tiaj sonĝoj ni ja povus paroli hodiaŭ vespere post glaso da biero. Nun ni ja devas diskuti la genteknikon, ĉu ne?“ Per la rakontita sonĝo Sven povis akiri intereson apartan ĉe Sakura. Ŝi ja antaŭe multe okupiĝis pri la eŭropa kulturo kaj tiel jam legis ion pri la greka kimero. Sed tio ne taŭgus kiel argumento kontraŭ la celoj de la esplorprojekto.

En Japanio la preteco disponigi sin kiel postmorta donacinto por organoj ĝis hodiaŭ estas tre malgranda. Tial tie ĉi okazis nur malmultaj transplantadoj malgraŭ la kompreneble tre urĝa bezono. Pro tio Sakura nur povis bonvenigi la eksperimentojn de la japana esploristo. Ŝi tiel kongruis kun Sven, kiu havis la saman opinion. Nur Volker restis skeptika. Li indikis diversajn argumentojn kontraŭ la metodo. Verdire pro religiaj kaŭzoj li ne povis aprobi eksperimentojn en kiuj homaj kaj bestaj ĉeloj estas kunmetataj por agi en organismo. Krome ne certis, ke post transplantado vere ne okazus neatenditaj kromefikoj. Plue li notis, ke por tia metodo oni bezonus amasegon da eksperimentoj kun bestoj. Lia opinio la esploristoj devas ankaŭ pripensi iom pli multe la bonfarton de la bestoj.

Sven bone komprenis la argumentojn de Volker. Sed li volis ne tiom rapide rezigni: „Jes, vi pravas. Oni vere bezonas pli altan nombron da bestoj por vivisekcioj. Sed pensu nur al la bestoj, kiujn ni ĉiutage buĉas por nia nutrado! Ĉiuj klopodoj por malpliigi la konsumon de viando ja tute ne sukcesis! Ja, estus tre bone, se oni kultivus la bezonatajn organojn en laboratorio. Mi pensas, ke intertempe jam komenciĝis kelkaj provoj. Sed oni devus tro longe atendi ĝis eventualaj sukcesoj.“ Volker kompletigis tion: „Estus eĉ pli bone, se oni produktus ĉiam dum naskiĝo klonon por ĉiu homo. Tiun oni povus poste laŭbezone uzi kiel rezervan organstokon. Ĉu vi ne spektis la filmon 'La Insulo' el la jaro 2005?“

Tiu 'hororo-filmo' priskribis la vivkondiĉojn por la



klonoj. Ili ĉiuj vivas en plene ŝirmita subtera konstruaĵo. Oni tute iluziigas ilin per la preteksto, ke nur ĉi tie travivi eblas, ĉar la instalaĵo protektas ilin kontraŭ la danĝera ekstera mondo. Por tamen doni iom daperspektivo kaj espero, oni rakontas, ke sur la tero ankoraŭ troviĝas unu insulo kun bonaj vivkondiĉoj, kompreneble kun limigita spaco. Tial okazas loterio ĉiusemajne por elekti tiujn, kiuj poste rajtas vojaĝi al tiu bela insulo. Verdire la loterio estas nur trompado. Oni nur elektas tiajn klonojn, kiujn oni ĝuste tiam bezonas por transplantado.

„Do, vi nun vidas, ke niaj japanaj sciencistoj elkovis pli humanan metodon“, komentis Sakura kaj per tio povis forigi la dubojn. La tri komencantaj studentoj decidis la daŭrigon de la diskuto je la venonta kunveno.

Tiun diskuton Sven ne volis ĝisatendi. En lia kapo cirkulis nun ĉiuj informoj, kiujn li lasttempe kaptis rilate al la temo bioteknologio. Hejme li tuj komencis plian traktadon. En la interreto li trovis amasegon da

tekstoj kaj filmetoj pri la japana esplorprojekto. Evidentiĝis, ke la metodo ankoraŭ ne estis sekurigita. La raportita sukceso nur temis pri eksperimentoj kun bestoj. Genetike ŝanĝitaj rataj embrioj ricevis fontoĉelojn de sana muso. Poste ili produktis pankreaton kun musaj trajtoj. Tiun organon oni poste transplantis en musojn kun diabeto. Rezulte tiaj musoj bone pluvivis. Eventuale tiuj eksperimentoj bone funkciis, ĉar estas nur tre malgranda genetika diferenco inter ratoj kaj musoj.

[*] sendiferencaĵoj, angle: *stem cells*, germane: *Stammzelle*, france: *cellules souches*
 [**] japana salut-esprimado, 'ha lo'

(daŭrigota)

verkis **Klaus Friese** el Germanio
 (plumnomo **Erik Tantal**)

Astrologio kontraŭ Psikologio - Julio / Kankroj



Laŭ la astrologiistoj la naskiĝintoj de ĉiu zodiaka signo havas karakteron propran je tiu signo. Jen laŭ ili la personeco de la « kankruoj »

Kankro-virino mi konis (mian patrino) kaj mirige la portreto taŭgas, eĉ en detaloj. Ŝi ŝatis iri sub la pluvo, pluki kaj manĝi nigran ribojn sur buterpano en la ĝardeno mem, la neĝon blankan, pentri, amumojn kaj kisojn, katojn, pluŝajn ursetojn, dragonojn, kaj kompreneble kartludi, kroĉetadi.

Jena filmeto de Martha Argerich kortuŝas min multe, ĉar ankaŭ ŝi maljuna estis restinta tre juneca kaj havis similajn kapharojn : <http://www.youtube.com/watch?v=7mFDXNODNyc>

Ankaŭ kankro-virino mi konis. Li estis pranevo de grava itala faŝisto, sed li mem estis ekstrem-maldekstulo kaj marksisto. Li estis devena de aristokrata familio, sed loĝis en ĉambreto 5a-etaĝe sen lifto en la plej malriĉa kvartalo de Parizo, kie li travagadis nokte de trinkejo al trinkejo. Ankaŭ lia

portreto koincidas, krom ke li estis en la vero malsana.



* **Virinoj :**

Korpo kaj sano

Ili surhavas mienon el milda, trajtoj, kiuj plurestas longtempe infanaspektaj, “cervina okulo” konstante iel “ĉaspersekutita”, aŭ gandaj okuloj, kiuj “manĝas la vizaĝon” al ŝi, ŝi estas pli kortuŝa ol bela. Ŝi precipe havas multe da ĉarmo, beletan freŝan haŭtkoloron, rideton tre junan eĉ ĝis dum maljuneco. Trovas du ĉefaj tipojn da ili : la « infana-virino », kaj la « nutreaca patrino », sed foje la du renkontiĝas samtempe ĉe la sama virino.

Ŝi havas emon malbonfartiĝi ekde kiam ŝi havas zorgojn aux angorojn, somatikeco (akiro de malsanoj ŝajne korpaj kaŭzitaĵoj pro psikostato) oftas. La « kankraj emas ricevi pezajn kruojn kaj retenis patologie akvon en la histoj. Al ili ofte “doloras ĉie”, spertas abruptajn kramfojn. Ili havas nervosistemon fragilan, emocieman naturon, ilia sano dependas de ilia feliĉo.

Ofte ili trovas sian ekvilibron en patrino, kaj amegas infanojn.

Ili facile ekploras, malamas maljunecon, tiun de aliuloj, kaj sian propran eĉ pli, eĉ iĝintaj mem maljunaj ili plu kritikis la maljunulinojn !

Kiel ŝi reagis ?

La „kankra“ virino multe revas. Infano ŝi ŝategas maski sin. Ŝi ege emas mensogi, aplombe, per bezono maskvesti la veron. Ŝiaj juĝokapablo ĝenerale

estas falsita per sia subjektiveco.

Ankaŭ ĉi tie patrineco povas igi ŝin malsama persono : pli respondeca, kun abruptaj ekflagroj da ordonemo, kaj pli da mensforto, ŝi ofte interesiĝas plu nur pri sia idaro.

Maltrankvileco igas ŝin elspezi monon, aĉetante sian tujan revaĵon por konsoli sin, eĉ se ŝia buĝeto ne prudente permesus tion.

« Fikseco » je la infanaĝo estas ege forta, ĝis plej alta aĝo. Foje oni trovas ŝin maljuna fraŭlino, neniam ducidinte forlasi siajn gepatrojn ; tiam ŝi entombigos ilin kaj malsaniĝos, ne elportante nek iliajn mortojn, nek sian solecon.

Ŝi estas ege sociema, nehontema, kaj sensinĝena, ridema, petolema.

Je kio ŝi taŭgas ?

Trovatas ŝi en ĉiuj la profesioj « patrinecaj » : beboartistinoj, psikologoj por infanoj, rekapablistino, flegistino, ktp. Ŝi ofte ricevas kvazaŭ miraklajn rezultojn dank' al la kontaktema virto, kiun ŝi havas kun junuloj.

Ŝi povas sukcesi ankaŭ en profesioj kaj agadoj rilataj al doma ornamo, meblaro. Dotita de fantazipovo kaj poezisento, ŝi verkas porinfanajn fabelojn. Ŝi havas senton pri koloro, desegnarto; kaj pentrado allogas ŝin. Ŝi faras bonajn fotojn. Ŝi estas ofte aktorino aprezita pro ties ĉarmo kaj kvazaŭ-natureco.

Kiel ŝi amas ?

Ŝi estas foje iom neŭroze « infano-virino », kio lasas ŝin malkontenta, kio daŭre malekvilibras ŝin. La ekvilibra kankra virino strebos edziniĝon kaj infanojn, se ŝi devas iam elekti inter sia profesia kariero kaj siaj infanoj, ŝi elektos la infanojn. Ŝi ofte dediĉas sin al tiuj ĉi malutile al sia edzo, kiu povas tiam iĝi ĵaluza je la infanoj.

*** Viroj :**

Korpo kaj sano

La korpo emas esti remburita, la karno pala. Mieno iom nematura. Li estas iel la « nostalgia poeto », kun la malkarnaj lipoj, la okulo kvazaŭ revema, rigardanta preter la videblaj formoj.

La unua malsano de la kankrulo estas ties hipohondrio, li konstate timas esti malsana, kaj fantaziigas al si malsanojn, kies li fine spertas simptomojn. Li timas morton kaj doloron, plezuriĝas priskribadante siajn malordojn, kuracigas sin per tri kuracistoj samtempe, senĉese telefonante por partigi al ili siajn ektimojn.

Kiam li sentas sin malbone, li instaliĝas en regresa stato: tio povas esprimiĝi per troa dormemo,

drinkemo, aĉetado de kukoj aŭ per malplenigi sian fridujon dumnokte, au travagi la urbon de trinkejo al trinkejo. Male al la trodormema kankrulo, estas ankaŭ tiu noktvagula, kiu ade trovas pretekstoj por prokrasti enlitiĝon, konjekteble subkonscia formo de lai timo kontraŭ morto.

Ofte li suferas alergiajn malsanojn, urtikario, psoriazo.

Li estas tre emociema kaj impresiĝema.

Kiel li reagis ?

La « kankra » estas estaĵo ĉarma, sentema kaj revema, sed ĉefe li estas nelacigebla atentkaptiga rakontisto. Des pli ke li posedas bonegan memoron, sed ankaŭ imagpovon ! Sed lia plej valora doto estas tiu pri intimeco. Ĉe li oni tuj sentas bone, sensinĝena, en fido. Li estas la plej alloga amiko. Eble ĉar li havas la naturecon kaj spontanecon de infaneco. Kaj ankaŭ tiu animfreŝeco, kiu gardis lin kontraŭ ĉia maljuniĝo.

Liaj reagoj estas elstare subjektivaj, li forte sentas tion, kion li spertas, kaj tio malhelpas lin elkateniĝi el sia emocia vidpunkto.

Li logtempe plurestas «dika bebeto », ĉiam strebante al iu patrino. Lia komforto, dorlotita kaj protektita vivo, kiu favoras lian pasivan flankon ŝajnas al li nepraj.

Fakte tiu falsa maldiligentulo laboras pli ol oni oni kredas, sed neniam li aspektas klopodi. Diletanto, ĉiontuŝulo, brila, kun multflanka inteligento, li interesiĝas pri mil temoj, en kiuj li malmulte enprofundiĝas, sed sentas.

Je kio li taŭgas ?

Ĉio fantazia konvenas al li : kino, poezio, ĉefe romana verkado, ankaŭ pentrado (prefere "naiva" aŭ superrealisma). Li ankaŭ havas bonegan kontakton kun amasoj, kun virinoj, kun infanoj. Li do povas prosperi en alpublika profesio, ligita al klientaro. Aŭ pri modo, dekoracio. Lia gusto al komforto kaj doma vivo igas lin bona instalanto. Li havas instinkto pri la oportuna gaĝeto, kaj scias tiom bone gin aĉeti kiel ĝin vendi.

Danĝero en lia profesia vivo: miraĝo. La emo rigardi siajn dezirojn kiel realaĵojn. Se li mensogas al aliuloj, estas ĉar li unue mensogas al si. Ĉio ĉiam estas tuj farota, li antaŭvidas mirindajn planojn, riĉeco staras ĉe la pordo, kontaktoj estas prenitaj, kaj li elspezas la monon, kiun li ne jam enspezis ...kaj neniam enspezos.

Ankaŭ en la teoria penso li reagis tiel ; se li estas socialisto, la revolucio estas ĉiam por morgaŭ, eĉ la regresojn li diras ke estas akriĝo de la klasbatalo kiu proksimiĝas venkon !

Kiel li amas ?

Se li ne havas emojn samseksemaj (foje), li

allogitas al virinoj, ofte pli junaj, al kiuj li estos ia patra figuro. Ili cetere ligiĝos facile al tiu spertula kaj nelacigebla amoranto. Diratas, ke li preferas kvanton al kvaliton, sed ankaŭ estas ĉar li plaĉas al la virinoj, kaj komprenas ilin plej bone, li tiom virineca mem. Li divenas ilin, sentas ŝiajn dezirojn, kuntiras ŝin kun li en fantasian kaj mirindecan mondon.

Sed li ne ĉiam facilas, malfidela, kaj eĉ pli maltrankvila, li povas fari kolerojn aŭ amajn ĉantaĝojn

kaj plezuriĝi en kompleksaj sado-masoĉaj situacioj.

Aliaj, pli stabilaj povas fariĝi bonajn kvietajn edzojn de afablaj virinoj, kiuj akceptos liajn etajn maniojn, plimalpli estos la reganto en la familio, kaj faros al li infanojn, kiujn li edukos perfekte, kun kiuj li scipovos ludi kaj kompreni. Male al la alia liaj pantofloj estos lia nura aventurŝipo.

verkis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofa Laocio, fondinto de Taoismo (46)

DUA PARTO - LA VIVO

71



**Scii la nesciecon,
tio estas la plej alta.**

Ne scii, kio estas scio, estas suferado.

**Nur, se oni suferas tiun suferadon,
oni liberigas sin de la suferado.**

**Ke la saĝulo ne suferas,
kaŭzas tio, ke li suferas tiun suferadon;
tial li ne suferas.**

Rimarkoj de Anniespera:

Kara Cezar, mi devas konfesi, ke tiu ĉi traduko, laŭvorte, estas tre fidela al la originalo. Tial ĝi estas tre pensiga, ankaŭ tre malfacile komprenebla. En Ĉinio oni kutime ĝin komprenas tiel, kiel la tradukon de Wang Chongfang:

„Scii, ke oni mem ne scias, estas plej bone;
Pretendi scii, kion oni mem ne scias, estas terura manko.

Nur tiu, kiu rekonas tian mankon kiel mankon,
Povas esti libera de tia manko.

La Saĝulo estas libera de ĉiaj mankoj,
Ĉar Li rekonas la mankojn kiel mankojn.
Jen kial Li estas liberaj de ĉiaj mankoj.“

Rimarkoj de Cezar

Mi tuj devis pensi en tiu ĉi ĉapitro pri la serena Sokrato, kiu laŭdire asertis: Mi scias, ke mi scias nenion. Ĝuste se tio okazas al mi, ke mi tuj devas pensi pri iu alia pensulo aŭ citaĵo mi fariĝas tuj misfidema kaj mi ekpensas: Ĉu tio estas ankoraŭ la origina Laocio aŭ jam „modernigita“ Laocio? Rikardo Vilhelmo bedaŭrinde ne estas tute libera de la tento esprimi sin en siaj tradukoj ĉeokaze iom tro alludeme, tiel ke oni devas ekpensi ankaŭ pri aliaj pensuloj. Povas esti ke la rekonataj tradukmanieroj en la tempo de Vilhelmo ankoraŭ permesis aŭ eĉ postulis tion. Sed nun oni sentas sin verŝajne kutime ĝenata, se oni havas tiajn tion-mi-jam ie legis-momentojn dum la legado de traduko tro ofte.

(daŭrigota)

Vizaĝoj

verkis kaj sendis Lenke Szász el Rumanio

*De homoj,
kiuj delonge estas polvoj,
restis nur fotoj.*

*Praŭloj -
geavoj, gepatroj, geamantoj,
sinjoro, sinjorino, servistino,
kampano, soldato,
ĉiuj kategorioj,
homoj,
kiuj suferis, ĝojis, amis,
naskis kaj kreskis infanojn,*

*militservis,
falas sur batalkampo,
restis nur fotoj.*

*Vizaĝoj
seriozaj aŭ ridetantaj
en fejsbuko – vizaĝlibro ekaperas,
kaj vi, praŭloj polviĝintaj
reviviĝas.*

*poemo de Lenke Szász
el Rumanio*



Ŝercoj



Tri edziĝintaj viroj renkontiĝis en kafejo.

Unu diras:

- Ĉu vi scias, ke kiam mia edzino gravediĝis ŝi estis leganta la libron "Jaĉjo kaj Malgosia". Do rezulte de tio ni havas du infanojn.

La dua diras:

- Kaj kiam mia edzino gravediĝis ŝi estis leganta la libron "Tri musketistoj", ĉu pro tio ni havas tri infanojn?

La lasta el ili subite ekstaras kaj kuras al la pordo, dum unu el la aliaj demandas:

- Kien do vi tiel rapidas?

- Mi rapidas hejmen, ĉar mia edzino nuntempe legas la libron "101 Dalmathundoj" !

La leĝoj de Azen Bugruvin (unue aperintaj en 2009)

- Ĉiu korpo submergita en akvo de bankuvo aŭtomate sonorigos poŝtelefonon en salono.

- Ĉiu korpo sidanta sur necesujo instigos amikon

sonorigi la pordon de la apartamento

- Se vi bezonas malfermi la pordon de via apartamento kaj vi nur havas unu liberan manon, la ŝlosilo troviĝos en la poŝo de la kontraŭa flanko.

- Pordoj nur fermiĝas solaj kiam vi forgesis la ŝlosilon interne de la apartamento.

- Se viaj manoj plenas je graso, estas tre probable ke via nazo komencu juki.

- Se vi kredas ke ĉio iris bone, plej verŝajne vi ne enkalkulis ĉiujn okazintaĵojn.

- Se vi estas tute trankvila dum ĉiuj aliaj ŝajnas frezezi, tre verŝajne vi ne komprenis la gravecon de la afero.

- La problemoj nek kreiĝas nek solviĝas, ili nur transformiĝas.

- Se televido elsendos du ege interesajn filmojn, certe ambaŭ estos je la sama horo.

- Se vi konservis ion dum tri jaroj kaj finfine vi forjetis ĝin pro neuzo, vi bezonos tiun aĵon post tri tagoj.



La serĉon sendis Craig Williams el Nov-Zelando

13>> kanapon kaj ne moviĝis. "Vi, Gregoro!" kriis la fratino kun levita pugno kaj insistaj rigardoj. Estis de post la transformiĝo la unuaj vortoj, kiujn ŝi senpere direktis al li. Ŝi kuris en la apudan ĉambron por preni ian esencon, per kiu ŝi povus vekti la patrino el ŝia sveno; ankaŭ Gregoro volis helpi - por savi la bildon ankoraŭ estis tempo -, sed li fikse gluis sur la vitro kaj devis perforte deŝiri sin; li kuris poste ankaŭ en la apudan ĉambron, kvazaŭ li povus doni al la fratino ian konsilon, kiel en antaŭa tempo; sed tiam devis senfare stari malantaŭ ŝi, dum ŝi traserĉadis diversajn boteletojn; krome timiĝis ŝin, kiam ŝi deturnis sin; botelo falis teren kaj rompiĝis; splito vundis Gregoron en la vizaĝo, ia kaŭstika kuracilo ĉirkaŭfluis lin; Greta prenis nun, sen pli longe heziti, tiom da boteletoj, kiom ŝi nur povis teni, kaj enkuris kun ili al la patrino; la pordon ŝi fermatis per la piedo. Gregoro nun estis disigita de la patrino, kiu pro lia kulpo estis eble

proksima al la morto; la pordon li ne rajtis malfermi, se li ne volis forpeli la fratino, kiu devis resti ĉe la patrino; li havis nun nenion por fari ol atendi, kaj premate de memriproĉoj kaj maltrankvilo li ekkrablis, superkrablis ĉion, vandojn, meblojn kaj plafonon kaj fine falis en sia malespero, kiam la tuta ĉambro jam turniĝis ĉirkaŭ li, meze sur la grandan tablon.

(daŭrigota)

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/transformigxo.html>



Krucvortenigmo

HORIZONTALE:

A – Batakomenc', sturm'
– ekzistas – estas blanke
varmega – agitiĝus,
furiozus.

B – Malkonsento – lokigu,
donu sur – konsekvens' –
tabulo por surmeti aĵojn –
la unua fluginto.

C – Latine „flugilo“ – rilata
al malutila ronĝulo – paŝ'
de kudromaŝino – rilata al
vidorgano – rusa virnom'.

Ĉ – Vicmontra numeralo –
eliganta videblajn radiojn
– reprodukt' de tekstoj – abolicie – instrumento.

D – Donace, dediĉe – valora pro malofteco – facile
fandebila metal' – distre, gajige – valora metal'.

E – Rilata al aŭdorgano – rilata al nia planedo –
individuoj – seksa amo – adjektiva finaĵo.

F – La kaŝita proverbo.

G – Simbolo de sulfuro – dezert' en Afriko – araba
virnom' – sperto, scio – rusa virnom' (Bulba).

Ĝ – Participa sufikso – rilataj al judgermana ĵargono –
riza brand' – elemento uzata en medicino – malgranda
akver'.

H – Kriplul', malgrandul' – legendoj pri dioj – membroj
– vira vesto – parto de plugilo.

Ĥ – La lasta vorto de preĝo – puraj, definitivaj –
frakcioj – likva manĝaĵo – marista brand'.

I – Komerca entrepren' – deponej' por aŭto – vibrad' –
viŝi per lango – simbolo de radiumo.

J – Famo, klaĉo – intima kunulo – bludiafana
juvelŝton' – elektitar'.

VERTIKALE:

1 – Korta birdo – loĝanto de amerika ŝtataro.

2 – Telekomunikiga aparat' – malgaŭ tio.

3 – Ampero – subite montriĝus – nei.

4 – Kilometro – rilataj al helena dio de milito –
interplektaĵ' de ŝnuroj.

5 – Inklin' – Javeo – malofte uzata persona pronomo.

6 – Malgrandul' – fabelhero' (Andersen) – mallongigo
por rezistanco.


7 – Son' de seka foliaro – dika metala fadeno.

8 – Tuno – ŝategata – la naŭa greka litero.

9 – Finaĵo de la prezenco – grupeto – 12-monata.

10 – Numeralo – delikatodora – adverbo de tempo (de
nun).

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 15 16 17 18 19 20 21 22 23 24



11 – Kaj tiel plu – maldolĉa – pronomo por aĵoj.

12 – Dorsflank' de monero – azia ŝtato – simbolo de
kalio.

13 – Simbolo de radiuso – blankŝela foliarb' –
enbanka havaĵo.

14 – Decibelo – apurivera foliarb' – vojŝanĝ' pro vento.

15 – Grupo – tonsignoj – konsento.

16 – Senakva, malhumida – ŝarĝitaj molekuloj –
Membro-Abonanto.

17 – Tuboforma – kunligas ŝnurojn – simbolo de
fluoro.

18 – Nom' de Kalocsay – grefti burĝonon.

19 – Nulo – ligna fajril' – muzika teatraĵ'.

20 – Virseksa pronomo – tub' antaŭ stomako –
numeralo.

21 – Komenci – flankiĝus de la vero – sur iu loko.

22 – Sentigi admiron – publika parolant' – litro.

23 – Montarĉeno inter Eŭropo kaj Azio – protekti,
sekurigi.

24 – Daŭre sonas – likopersik'.

Fonto: **Semajno de Enigmoj #5**

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)

Patricia (1986)



Patricia, hematita (okra rugha) kaj blanka kretroj sur kremkolora papero, 30 x 40 cm, 1986

Kiam mi estis pro kuracado en Lindau, subdistrikto Zerbst, mi dividis mian ĉambron kun iu instruistino. Ŝi montris al mi nigra-blankan foton de sia filino Patricia. Ŝia rido estis tiom rava, ke mi volonte volis pentri ŝin. Ŝi donis al mi la foton.

Kiam la hematit-kreta desegnaĵo estis preta, ni telefonadis sufiĉe ofte. Tamen, preno de la bildo ne okazis. Dum GDR-tempoj mi devintus vendi la pentraĵon kontraŭ nur 30 markoj. Pro la fakto, ke la ĉarma infanportreto al mi mem tiom multe plaĉis, mi iel ĝojis, ke mi ne devis vendi ĝin. Kun sukceso mi uzis ĝin dum diversaj ekspozicioj. La bildo allogis sur invitkartoj kaj per afiŝoj kun bona sukceso por inaŭguroj de diversaj ekspozicioj. En mia ateliero montrofenestro ĝi trovis admirantojn kaj varbis

sendis Helga Plötner el Germanio

klientojn. Dum certa tempo tiu ĉi bildo estis mia varbsimbolo. Post ĉ. 7 jaroj la familio surprize kaj sen antaŭanonco staris en mia ateliero. Patricia intertempe jam estis 12-jara.


Spontanee, kvazaŭ el la ventro, mi aŭdis min mem: "nun vi ne plu ricevos la bildon, eĉ se vi pagus 10.000 markojn!" Sekve la patrino de Patricia diris: „Kaj se ni donos al vi 10.000 markojn!“ Kaj mi respondis spitante per forta voĉo:

„Ne, nun mi ne plu povas fordoni la bildon, eĉ ne por 10.000“, kvankam mi vere bezonintus la monon. Ĝi estas mia plej bela infana portreto kaj mi ĉiam prezentas ĝin dum miaj ekspozicioj. Mi nur farus duoblaĵon por vi!“

Tiel ni trovis solvon per duoblaĵo de la sama portreto.

Tiun ĉi mi transsendis per poŝto. La sendaĵo revenis kun la rimarko, ke ĝi ne estas la sama bildo. Ili ne povis kompari tion, ĉar mi ne donis al ili foton. Laŭ mia imago ĝi vere similis al la originalo. Mi estis konsternita. – Bonŝance, tia situacio ne plu okazis al mi. Nun mi posedas dufoje „la Patricia“. La duan desegnaĵon mi uzis por spontaneaj subĉielaj ekspozicioj, por privarbi novmendojn. Jes vere, la originala desegnaĵo ne estas superebla kaj restas por mi sankta objekto.

sendis Helga Plötner portretistino el Germanio



Ho mia Dio !

un taĝon, Maria volis vojaĝi de İstanbulo al İzmir. Maria aĉetis aŭtobus-bileton. Ŝi estis malĝoja. Ŝi diris al la ŝoforo: "Mia senliphara nigra kato estas en ĉi tiu plasta skatolo. Bonvolu esti atentema pri ĝi!"



La nomo de la ŝoforo estis Peter. Peter prenis la plaston skatolon kaj metis ĝin en la valizujon sub la aŭtobuso.

Je la unua ripozoloko la ŝoforo zorgis pri ĝi sed li ne aŭdis miaŭon. Je la dua ripozoloko la ŝoforo zorgis pri ĝi sed li denove ne aŭdis miaŭon. Je la tria ripozoloko la ŝoforo zorgis denove pri ĝi sed denove

amuza rakonto de Safak Yildiz * el Turkio

neniu miaŭo aŭdiĝis.

Li maltrankviliĝis kaj malfermis la skatolon kaj trovis mortintan katon en ĝi.

Li diris al si: "Ho mia Dio! Ho mia Dio! La kato mortis. Kial ĝi mortis? Nun kion mi faros? La virino malĝojos kaj koleros kontraŭ mi! Ho mia Dio!"

Peter serĉis unu nigran strat-katon kaj trovis ĝin. Li tondis ĝiajn lipharojn kaj vidis, ke ĝi estis sufiĉe simila al la morta kato. Li anstataŭigis ĝin kun la morta kato en la skatolo.

Kiam ili atingis İzmiron kaj Maria reprenis la skatolon ŝi rigardis en ĝi kaj ŝokiĝis. Ŝi diris: "Ho mia Dio! Ĉi tiu ne estas mia kato. Hieraŭ mia kato mortis kaj mi volis enterigi ĝin en la ĝardeno de mia domo en İzmir. Kie estas mia kato? Ho Mia Dio!"

verkis kaj sendis **Safak Yildiz** el Turkio

* *Safak Yildiz estas komencanto en Esperanto*

Oni ofte aŭdas – efektive temas pri fakto vaste rekonata – ke la literaturistoj grave kontribuis al la evoluigo de Esperanto. Mi ne kontraŭstaras tion: la literaturistoj ja grave kontribuis – sed tio ne signifas ke ilia kontribuo estis pozitiva. Eĉ male.

Se oni serĉas tra PIV oni trovas amason da vortoj kun la indikoj G (Grabowski) aŭ K (Kalocsay), ekzemple insurekcio, beata, uvo (G), kaj lazura, lontana, pita (K). Tio montras, ke tiuj verkistoj estis inter la unuj, kiuj uzis tiujn vortojn en Esperanto.

Se oni protestas kontraŭ la uzo de tiaj vortoj, literaturistoj klarigas, ke ili nepre bezonas “literaturan lingvon”. Kial? Kial ili ne povas esprimi siajn pensojn kaj emociojn per la normala vortprovizo, kiun uzas ĉiuj? Kial laŭ ili la vorto trista tuŝas la koron pli ol la vortoj senĝoja aŭ kordolora? Kial lazura estas pli poezia ol ĉielblua?

Poetoj asertas, ke la mal-vortoj estas maloportune longaj, kaj tial ili bezonas pli mallongajn alternativojn. Sed unu el la trajtoj de poemo, kontraste kun prozo, estas ke ĝi estas verkita laŭ pli rigida skemo. La lerteco de la poeto konsistas interalie el ties kapablo esprimi ideojn interne de tiu skemo. Se por solvi problemon pri silabonombroj li/ŝi tutsimple inventas novan vorton, kie troviĝas la poeta lerto?

Vorto kiel malmultekosta ja estas longa – sed ĝi ne enhavas pli da silaboj ol la samsenca itala vorto economico. Sed neniu itala poeto, laŭ mia scio, iam plendis, ke tiu vorto estas tro longa, des malpli ordinara parolanto. Do, kion faras la italaj poetoj? Ili faras tion, kion poetoj ĉiam faras: streĉas sian cerbon kaj elpensas trafan esprimon interne de la rimedoj, kiujn la lingvo jam proponas al ili. Tio estas la tasko de poeto. En Esperanto, ekzemple, oni povus anstataŭigi la vorton per pluraj alternativoj: bonpreza, senvalora, malluksa, trigroŝa.

Strange, la argumento pri troa longeco ial forgesiĝas, kiam poeto nepre deziras uzi la vorton firmamento anstataŭ ĉielo. Estas vere, ke al parolanto de la angla aŭ la franca firmamento efektive havas iom poezian sonon, ĉefe ĉar oni renkontas ĝin nur en poeziaj kunteksto. Tial Esperantaj poetoj enportis ĝin en sian “poezian lingvon”. La vorto tamen ne troviĝas en neparencaj lingvoj: en la finna ekzemple, aŭ en la japana. Do, kion pensas finno aŭ japano legante tiun vorton? Ĉu ĝi trafas aparte poezie? Pli verŝajne, tio estas simple nova vorto por serĉi en la vortaro, vorto kiun poste necesos lerni. Ĝia poezia kvalito ne estus klara al homo, kiu neniam renkontis ĝin antaŭe. Interese, “ĉiela volbo”, per kiu PIV difinas ĝin, al mi

impresas multe pli poezie ol la neanalizebla vorto firmamento.

Iam, nesperta itala esperantistino petis min lingve kontroli poemon, kiun ŝi mem verkis. En tiu poemo mi trovis la eksterordinaran vorton krepitas, kaj serĉante en PIV mi malkovris, ke tio signifas “Aŭdigi kraketadon, serion da etaj sekaj eksplodbruoj”. Mi do sugestis, ke ŝi uzu anstataŭe kraketas. Ŝi respondis, ke ŝi nepre deziras krepiti, ĉar tio apartenas al ŝia poezia stilo. Sendube al italo tiu vorto sonas tre bele, ĉar ĝi pensigas pri la itala verbo crepitare. Al mi, kiu ĝis tiam neniam renkontis tiun nekutiman verbon, ĝi impresis nur strange kaj eĉ malelegante.

Unu el la plej konataj poemoj en Esperanto estas La vojo de Zamenhof. Ĝi estas plena je esprimoj, kiujn esperantistoj ankoraŭ nun konas kaj citas: “rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante”; “eĉ guto malgranda, konstante frapante...”; “ni semas kaj semas konstante”. Kaj tamen tiuj esprimoj, kaj fakte la tuta poemo, utiligas nur la plej simplajn vortojn, vortojn kiujn oni uzadas en sia ĉiutaga babilado. Same oni povas diri pri lia traduko de Hamleto. Jen la parolado per kiu la mortinta reĝo de Danujo priskribas al Hamleto siajn suferojn en la posttomba vivo:

*Mi estas la spirit' de via patro,
Mi estas kondamnita longan tempon
Vagadi en la nokto kaj bruladi
La tutan tagon en eternaj flamoj,
Ĝis mi puriĝos de la ĉiuj pekoj
De mia tera vivo. Se ne estus
Al mi malpermesite paroladi,
Rakonton tian povus mi komenci,
De kiu ĉiu vort' al vi disprenus
La koron, rigidigus vian sangon,
El kapo elsaltigus la okulojn,
Kaj ĉiun vian haron disstarigus
Simile al haregoj de histriko.*

Nesperta esperantisto verŝajne devus serĉi la vorton histriko en vortaro (temas pri besto kun longaj pikiloj), sed krom tio la vortprovizo ne prezentas apartajn problemojn.

Se la literatura vortprovizo restus nur en la poezio, mi ne sentus la bezonon verki ĉi tiun artikolon.



Sed dum la lastaj dudek jaroj tiuj literaturaj vortoj ĉiam pli emas migri en la normalan lingvouzon; tial en ordinara babilado oni nuntempe ofte aŭdas la vortojn kurta, povra, uvo ktp. Verŝajne la uzantoj eĉ ne konscias, ke tiuj vortoj estas iamaj inventaĵoj de poetoj, kiuj deziris distingi sian lingvouzon de tiu de la ĉiutaga vivo. Farante tion, la verkistoj grave malutilis al Esperanto, kies vortprovizo tiom kreskegas, ke la Esperanta vortaro iom post iom minacas fariĝi same ampleksa kiel tiu de la angla. Kaj cetere, kion faros nun la literaturistoj, kies vortelekto perdis sian elitajn karakteron kaj fariĝas tiu de la ĉiutaga parolado? Ĉu ili kreas novan vortostokon por plumontri sian superecon al la ordinara parolantoj?

La ĉarmo de literatura stilo dependas de la trafeco de la elektitaj vortoj, de ilia kapablo precize

sed samtempe elegante transdoni al la menso de la leganto la esprimatan ideon. Bona literaturo konsistas precipe el la enhavo. Se oni dependas ĉefe de belsonaj vortoj por doni poezian nuancon al teksto, oni kreas nur dekoraciitan ŝelon: malplenan konstruaĵon kun nenio interne.

Aŭtoro: **Anna Löwenstein**

el **Esperanto**, la oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Oktobro 2009

Fonto: <http://reto.cn/php/esperanto/la-poetoj-detruas-nian-lingvon/>

Elplugu floron

tradukis kaj sendis **Carmel Mallia** el Malto

Elplugu Floron

Elplugu floron, flaru la parfumon;
akvumu ĉi ĝardenon kun sopir';
aŭ aŭskultu de l'akvo la cirkulon
ĉe la fontana eĥo kun delir'.

Aŭdu la kantojn de l'ĉirpantaj birdoj
tra la folioj for de nigra nest';
el ĉiu arb' elplugu la dezirojn;
manĝu ilin bongustajn dum ĉi fest'.

El la radikoj anonciĝas l'arboj
en la riĉaj stratumoj de la ter';
tie troviĝas la sanec', la povo,
kie pacienciĝas la tuber'.

Ampleksa, senegala, festa flustro:
de l'forkoloroj la apoteoz';
aŭskultu de l' venteto la dancadon
en la etoso de ĝarden-ripoz'.

-- poemo de **Charles Bezzina** *

* *Poeto; verkis pri la historio de la lasta mondmilito en sia insulo: Gozo.*

tradukis kaj sendis **Carmel Mallia** el Malto



Poeziaĵoj de Ilir Zhiti

tradukis kaj sendis **Bardhyl Selimi** el Albanio

Alia paradizo ne ekzistas

*Mi estis pripensante
tion kion ĉiuj homoj
fakte rememoras ofte:
Ĉu ekzistas paradizo?*


*Aŭ tio estas imageca rezulto
naskita de nia eterna deziro,
por ke ne finiĝu ĉi tiu laciga vivo
plenplena je senfina malkvietaĵo
entombigita en du kvadrataj metroj.*

*Transpasinte ondan maron da zorgoj
Tra multaj hatoj kaj amoj
Tra forlasoj kaj indiferentecoj,*

*Fare de niaj karaj kaj proksimaj homoj.
Ĉe fino de la vojaĝo
Ni komprenas gravan kozon:
Nenia paradizo ekzistas
Ĉio estas ja iluzio
Rezulto de deziro kaj imageco
Kreaĵo kvazaŭ en infanaj fabeloj*

*Ekzistas en nia vivo nur reala paradizo
Kio ofte similas al infero.
"La tempo kiam oni amis kaj ni amis vere
niajn karajn kaj proksimajn homojn.."*

Tirana, 27.2.2018



Victor Sadler forpasis

La 24an de majo 2020 en sia 83a vivojaro forpasis Victor Sadler (1937-2020)


Brita filologo, programisto kaj esperantisto (ekde 1951), li post sia doktoriĝo pri fonetiko (1962) dum dudeko da jaroj laboris en la Centra Oficejo (CO) de UEA en Roterdamo kiel redaktoro de Esperanto (1962-74), redaktoro de La Monda Lingvo-Problemo (poste Language Problems and Language Planning, 1969-72), direktoro de CO de UEA (1968-80), ĝenerala direktoro de UEA (1980-83). En CO de UEA li prizorgis la eldonadon kaj la bibliotekon Hodler, plenumis la taskojn de KKS (1974-76), kaj estis administranto de Instituto Hodler '68 (1979-83).

Post la forlaso de CO Sadler pasigis du jarojn en Brazilo kaj de 1985 ĝis sia emeritiĝo (2002) laboris en Utreĥto (Nederlando) kiel programisto ĉe la kompanio BSO, interalie, dum la kvin unuaj jaroj li okupiĝis pri la projekto Distribuita Lingva Tradukado (DLT), en kiu Esperanto ludis kernan rolon.

Victor Sadler estis estrarano de UEA pri financo (1986-87) kaj membro de la Akademio de Esperanto (1970-83). Li verkis kelkajn broŝurojn pri Esperanto,

terminaron pri budhismo (1962), Esperanto-sinhalan vortaron (1963), fakajn studojn pri DLT. Sadler estas aŭtoro de la poemaroj: Memkritiko (1967) kaj Perversaj rilatoj (2015). Ekde la fino de la 1980aj jaroj li ne plu aktivis movade.

Ni funebras kaj kondolencas al lia vidvino Maiumi Sadler-Hamada, kiu helpis nin ĉe la kontaktoj kun Victor Sadler por la artikolo pri li en la enciklopedio Nia diligenta kolegaro (NDK).



**Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov**

Fonto: **La Ondo de Esperanto**

<https://sezonoj.ru/2020/05/nekrologo-49/>

5>> ekzemple la onklo-figuro en la filmo estas tute kontraŭa. Pri kio virino rilatas al Konfucejo, li pensas kaj eldiras. Virino devas lerni skribadon laŭvirina stilo, nur tio! Seibej estas humiligita ĉar li odoras kiel fiŝo antaŭ la sinjoro de la tribo. La onidiroj venis al la oreloj de lia onklo. Lia onklo estas kolera. Estas ankaŭ alia kialo por la onklo viziti lin; li volas edzigi lin al bona virino. Sed kiu volus edziniĝi al tia aĉa, memforlasinta, vidva viro, vivanta kun siaj du filinoj kaj patrino? Sufiĉas, ke ŝi estu virino, kiu donos al li sanajn infanojn! Oni ne devas serĉi belecon. Seibej, rifuzas. Kiel ni vidas dum la tuta filmo li havas obstinan sintenon, kiu ne malhelpas al lia respekto kaj li staras senpere. Se li forlasas sin. Li havas problemojn pri vivtenado kaj li ankaŭ ne volas uzi sian potencon. Ĝi estas efektive potenca. Precipe kiel militisto. Ni vidas ĉi tion en du apartaj scenoj en la filmo.

1) En la glav-batalo sceno kun majstro Koda li uzas lignan glavon kontraŭe al la tradicio kaj deklaras, ke li intencas ne mortigi; kvankam tio estas ekster la samuraja etiko. Kaj li mizerigas Kodan. La batalsceno ĉi tie estas tre bona. Mezurita kaj efika. Ne estas sango, perforto, longa luktado ka. Seibej montras sian majstrecon per propraj kaj spritaj frapoj kaj defendo. Plie, li avertas sian apudan amikon ne menciigi ĉi tion al iu alia. Ĝi evitas sinmontriĝon.

2) Kaj en la fino; en la batalsceno kun la ribelema samurajo Zenemon Yogo, kiun Daimyo (la



Vera foto de Samurajoj el la jaro 1880 (foto de Kusakabe Kimbei / Arĥivo de Hulton)

sinjoro de la tribo) ordonis, ke li mortigu. Ĉi tiu estas sceno iom pli longa, kaj samtempe scene kie la du majstroj antaŭ ol la lukto interparolas pri siaj ĝenoj, financaj problemoj kaj humoroj. Li diras, ke li ne sentas sin preta por la tasko, do li rifuzas la ordonon de Daimyo aldonante, ke "li havas neniun deziron uzi sian glavon", "li nun perdis ĉi tiun deziron pro siaj du filinoj kaj la maljuna patrino kaj la financaj malfacilaĵoj." Malgraŭ tio, li estas devigita akcepti la oferton ĉar li bezonas monon. Post malfacila glav-batalo, li vundiĝas sed mortigas mastron Samurajo Yogo.

Li kuniĝas kun Tomoe, kiu vere amas lin. Al Tomoe, la helpema kaj lojala virino, kiu ne zorgas pri

>>31



"Ο Βασιλεύς Δημήτριος", poemo de greka poeto Konstantinos Kavafis el Aleksandrio Egiptio (1863 – 1933)

Post kiam la Makedonanoj forlasis lin, evidentigante, ke ili preferis Pirhuson, reĝo Demetrio (li estis altanima!) tute ne kondukis, kiel oni tiam diris, kiel reĝo. Li iris demeti siajn orajn vestaĵojn, li ĵetis for siajn ŝuojn elpurpurkoloritajn; li surmetis tre simplan vestaron, kaj fuĝis. Tiel farinte kiel aktoro, kiu fininte la prezentadon ŝanĝas la kostumon, kaj foriras.



tradukis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

La dometo de feliĉo

tradukis kaj sendis Antanas Vaitkevičius el Litovio

Printempaj strofoj

Trilas ie birdino -
Jam malordas la kor'
Kaj Venuso alvenas
Kun la flora dekor'.

Kaj Venuso alvenas
Kun la flora dekor',
Trilas ie birdino -
Jam malordas la kor'.

Kun floretoj ekfloras
Inter ni bela am'
Pasintecan sonoron
Mi ne aŭdas plu jam.

Pasintecan sonoron
Mi ne aŭdas plu jam.
Kun floretoj ekfloras
Inter ni bela am'.

Per la blanktrifolioj
Kaj la verdtimian'
Vian bruston tenere
Mi ornamos sen van'.

Vian bruston tenere
Mi ornamos sen van'
Per la blanktrifolioj
Kaj la verdtimian'.

Ĉarma bluhepatiko,
Estu mia, aŭ ne.
Vortoj ĝenas la amon -
Ĉiuj konas, ho ve!

Vortoj ĝenas la amon -
Ĉiuj konas, ho ve!
Ĉarma bluhepatiko,
Estu mia, aŭ ne.

Mi kun lipoj ĉe lipoj
Povus vivi ĝis mort'.
Min timigas nenio,
Eĉ funebra la fort'.

-- poemo de Bernardas Brazdžionis el Litovio



tradukis kaj sendis **Antanas Vaitkevičius** el Litovio

Bill Chapman forpasis

La 21an de majo 2020 pro la koronaviruso COVID-19 mortis Hilary "Bill" Chapman (1950-2020)

Brita instruisto, socia aganto, urbestro de Conwy (Kimrio) kaj esperantisto (ekde 1967), konata en Esperantujo kiel Bill Chapman; ĉefdelegito de UEA por Britio, esploranto de la historio de Esperanto, aŭtoro de pluraj tiutemaj artikoloj (ankaŭ en La Ondo de Esperanto) kaj de la libro The Early History of Esperanto in the United Kingdom (2019).

Ni funebras kaj kondolencas al liaj parencoj, amikoj kaj samideanoj.

Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov



Fonto: **La Ondo de Esperanto**
<https://sezonoj.ru/2020/05/nekrologo-48/>

Komentario de Dr. Hinohara Ŝigeaki
(Ĉefdirektoro de St. Luka Internacia Hospitalo)
al "Propono al Trankvila Morto"¹
de Dr. Isitobi Kozoŭ, Eldonejo Kodanŝja, 2013)



[Dr. Hinohara Ŝigeaki (1911~2017) laboris en la St. Luka Internacia Hospitalo (1941~2014) en Tokio. Li postlasis multajn grandajn Meritojn en sia longa vivo, sed devas esti speciale menciita pri tio, ke en la jaro 1995 kiel la hospitalestro li tute malfermis lia hospitalon al la 640 damaĝitojn pro sarino, kaj gvidis sur fronto kuraci ilin.]

Ĝenerale, de kiam japano ne povas morti trankvile? Kiam oni finlegis la libron de Dr. Isitobi, oni pripensos tiel. Kvankam multaj japanoj deziras morti en siaj hejmoj aŭ kadukulejoj, 80% de la popoloj mortas en hospitalo. La fakto montras ke la plejmulto estas kontrolita sub kuracado ĝis sia lastmomento. Fakte, en la atesto pri morto de doktoro, rimarkeble malmutiĝis la skribaĵo "kadukeco", kiu troviĝis multe antaŭ milito. La skribaĵo estas permesata nur kiam alia skribabla kialo mankas ĉe la morto de maljunulo. Fakte ju pli la tekniko de kuracado altas, des pli multaj rimedoj por vivlongiĝo estas praktikataj. Nome, oni ne povas morti nature.

Sed, kiel Dr. Isitobi spertis vivriske en la maljuna kadukulejo, la maljunula alpaŝo al morto estas origine malrapida kaj milda. "Morti velkeme" estas bona esprimo. La dehidracio kaŭzita pro kadukeco donas sin mildan morton kun malprofunda doloro. La vorto de Platono "Kvankam ĉiuj kontraŭ naturo donas doloron, la paŝo al fino kune kun maljuneco donas sin preskaŭ plej malmultan doloron en sia morto" estas vera kvankam dumil jaroj jam pasis de tiam. Laŭ la ĝis nuna medicina komuna saĝo, dehidracio estas evitenda kaj nutrajxo estas provizenda dum vivo. Tamen, ekscesa nutrajxo kaj akvo estas ŝarĝo por korpo baldaŭ irona al finvivo, kaj tio sekvigas doloron.

Alivorte, nuna medicino malfaciligas trankvilan kaj mildan morton. Plie la eksesa espero de la familianoj al la medicino instigas la medicinon. Se eĉ kuracisto juĝus saĝe, ke plia medicino devas esti detenita, la observanta familiano senkuraĝiĝe dirus ke doktoro faras nenian rimedon per eĉ unu gutinjektado, kaj postulus ian rimedon de kuracisto. Ili riproĉas kuraciston pro kio, ke kvankam medicino povas reteni la vivon ĉi tie, eviti terapion estas kruela. Mi komprenas tian familian ĉagrenan koron, ke ili riproĉas sin mem samkiel kuraciston. Probable, unu

ekzemplo estas gastrostomio en la etapo de finvivo.

Dr. Isitobi estis frapita de la kontraŭdiran realon post li eklaboris kiel regula doktoro de la speciala maljuna kadukulejo. Ĉu estas permesite, ke ni konfidas al medicino la morton, la plenan kolekton de la vivo, ne vivante mem? Pri tio unue sin demandis li, kiu estis la plej progresema sangvaza kirurgo. Kiel ni devas vivi al morto? Kion devas fari la medicisto, kiu ĉeestas en la finvivo kaj kompletigas la vivon? Kaj kion ni ne devas fari se ni eĉ eraras? Se la demando ne estus unue, la trankvila flegado ankoraŭ ne realigus en la speciala maljuna kadukulejo en Asihana. Tial la demando prenas la profundan kaj gravan esencon.

En nia tripersona konversacio de Dr. Isitobi, kaj sino Kaŭasima Midori kiu ankoraŭ kontribuas multe al la flegada mondo, mi havis la ŝancon demandi Dr-on direkte pri la temo. "Dr. Isitobi, vi dediĉis vin al kuracado, kaj en sesdekjaro dubis mem ĉu estas bone ke vi lasos vin tia. Kio estis la ŝanco?" mi demandis. Pri tio, li parolis retroirinte al tiu epoko kiam li eklaboris kiel regula doktoro de la speciala maljuna kadukulejo. La detalo estas skribata en lia libro. Speciala maljuna kadukulejo estas dumviva akceptejo por alta flegagrado kaj bone konata ke ĉie kadukulejoj havas la atendantojn kelkdekajn de fiksa nombro. Dr. Isitobi estis vicprezidento kaj sangvaza kirurgo de la farma hospitalo. El la plej ekstrema labordevo li fariĝis regula doktoro kiel flegisto de maljuna kadukulejo kie li sidas tuj proksime al maljunuloj kvankam li komprenas la novan taskon per kapo. Li estis frapita de la rekte nerigardeblaj scenoj, kiam li unue rondvizitis cent maljunulojn, kiuj havas averaĝe 90 jarojn. Kelkaj 20% de ili havis progresivan demencon. Ili ne povis interkompreni kaj ankaŭ gluti malsupren manĝaĵon de buŝo, do ili devas ricevi nutron pere de gastrostomio aŭ gastrotubo tra nauzo kaj banale kuŝi en litoj. Dr. Isitobi paloris "Vidinte la malsanulon kun kiu mi kiel kirurgisto bataladis en vivmorta embaraso en tia nesupozebla situacio antaŭ miaj okuloj, mi devis vere dubi kio la tutkorpa kaj tutanima batalado estis por la malsanula vivo." Plie li parolis malkaŝe "Antaŭe kiam mi trovis la paciencon kiu hezitis ricevi grandan operacion, mi riproĉadmonis ilin bone zorgi mem. Tiam mi neglektis sian aĝon kaj propran principon." Audinte lian paloradon, mi supermetante pripensis pri lia evolucio en la kredo post ŝanĝo de lia laborejo kaj mia pasinteco. Kvankam li estas 24 jarojn pli juna ol mi, mi apenaŭ malfermis mian okulon al la terminala

kuracado en sesdekan jaron. Ĝis tiam, mi kredis ke doktoro devas klopori por longigi vivon de preskaŭ mortonta patiento ĝis la lastmomento. Mi neniam pensis ke truda vivlongiĝo ne nur donis doloron al la patiento sed eĉ malaltigis la dignecon de la vivo.

Kiel Dr. Isitobi skribis en lia libro, medicino ankoraŭ ne multe traktas morton aŭ flegadon. Se la morto estas kontinue konsiderita kiel malvenko de medicino, la konsekvenco estas klara. Kiel ajn medicino progresus, ĝi fine ne povus kontraŭstari morton. Ĉia vivo mortos. Ĵus kiam humiliĝo por la natura providenco estas forgesita, englutite en la ondo de medicina teknologio, neglektite la forton kiun homo nature havas interne, la fundamenta signifo de vivo pli retiremas sin kaj oni traktas nur la fizikan fenomenon. Tri personoj (Dr. Isitobi, S-ino Kaŭasima kaj mi) forte sentas necesecon de la granda ŝanĝego en la nuna kuracado en medicina, flegada, kaj prizorga mondo.

Nun, la tagoj kiam Dr. Isitobi en la speciala maljuna kadukulejo komencis kun tia impulse ankaŭ estas por la neperceptebla batalado kontraŭ la pneŭmonio pro misgluto. Estas fame konata de la enketo en la jaro 2011, ke la pneŭmonio akiris la 3an malsanon preterpasante la malsano de cerba sangovazo. Certe, la mortokaŭzo de grandaĝulo multe estas pneŭmonio. La personaro en speciala maljuna kadukulejo devas skrupule atentadi pro misgluto. La leganto de la libro ankaŭ sentos la eksterordinaran streĉon. Ĉiuokaze, la mekaniko en engluto estas tute trekompleksa kaj tre alta movado, do unuafoje la nerva perturbo okazus, senprokraste engluto farus malfacile. Pro maljuneco kaj malaltiĝo de la funkcio, oni sufokiĝemas. Se oni plie ricevus nervan perturbon pro cerba apopleksio aŭ demenco, iometa manĝaĵa peco aŭ akvo erare enirus en bronkgastro kaj pneŭmonio okazus. Tiam al la persono kiu malaltigas de engluta funkcio, kuracistoj rezignas la aranĝon provizi manĝaĵon per buŝo antaŭtimate la krizon de morto, kaj ili provizas nutrajxon per gastrostomio aŭ gastrotubo tra nauzo. Ĝi estas normala aranĝo por la malfacila engluto.

Tamen Dr. Isitobi ĉagreniĝis la fakton, ke la gastrostomio ne povas preventi pneŭmonion pro misenglutado. Ĵustempe, li konis flegecon en Mijake-

insulo (Tokjo). Baldaŭ li faris unu post alia la sekvantan prizorgon en la maljunulejo. Nome, senhelpite de gastrostomio oni donis malrapide la bezonitan manĝaĵon po iom per buŝo por subteni la trankvilan vivon.

Tiel kaj ĉi tiel, lia tre simpla demando "Kiel vi faras kiam vi ne povas plu manĝi per buŝo?" atakis kernon de la skuiĝanta koro de la familiano, kiu rekte frontas la mortonta maljunulo, kun la vorto "la trankvila morto". Kaj ĝi elvokis la neniam faritan publikan opinion pri la praveco de la gastrostomio. Tamen mi ne devas ripete diri, ke li demandis nin ne nur pri la praveco de la gastrostomio, sed pri nia privata vivmaniero al nia plej lasta stadio.

La kuracado ĝis nun celis nur la vivan kvanton kaj longecon, sed ni devas celi profundecon ol longecon, kaj kvaliton ol kvanton de la vivo. Kiel poeto Lirke diris "Homo estas simila al pomo kiu havas semon en la centro", ni naskiĝis jam havante semon nome morton. Kiel ni nutras la semon? Kiel ĉiuj respektive finfaras sian propran morton? Ni devas vivi vidante aktualan vivon de venonta morto. La kuracisto subapogas apude la homon dezirante ilian vivon daŭre kontenta.

Mi konsentas la manieron de prizorgado kion Dr. Isitobi intencas realiĝi, kaj lian nomadon "la trankvila morto" por tio. La mian konsenton mi transdiris al li en la okazo de interparolo kaj konversacio. Plie mi pensis la neceseson de angla esprimo por transparoli la trankvilan morton al alilandanoj. Kiam mi demandis lin kiel ĝi devas esti esprimata en anglan, mi promesis ankaŭ pensi mem pri tio.

Mi pensas jene: La tempo antaŭ morto kun familianoj kaj intimoj ne estas "fino", sed "ekiro" al la eternavivo. Tial la kelka tempo estas simila al tio ke bebo montras trankvilan dormavizaĝon liberante korpon kaj koron aŭskultante lulkanton kantatan de patrino. Do mi proponas esprimi la trankvilan morton kiel "la pacplenan eternavivon!".

¹ Pri "Propono al Trankvila Morto de Dr. Isitobi Kozoŭ," ni skribis jam en la gazeto *Turka Stelo* de numero 47 (2019) al numero 51 (2020).

tradukis kaj sendis **Kacu MATOBA** el Japanio

Louis Beaucaire: Kiel mi fariĝis kunfondinto de UEA

am sidante en la granda salono de la Sentema Mimoso, mi trankvile tintigis per la maldekstra mano du glacierojn en mia glaso da aperitivo, dum mia dekstra mano komforte kuŝis sur la larĝa, gastama postajo de mia apudulino Tina. Ambaŭ ni observis sceneton, kiu okazis en la salono inter ĉina maristo kaj la ruĝhara Zora. Uzante miksaĵon el tri piĝinoj kaj mime enŝovante per la fingroj imagan manĝaĵon en sian ŝmacantan buŝon, li provis komprenigi al ŝi, ke li deziras frandi ŝian interfemuraĵon.

Kiel sperta putino Zora kutime akceptis ĉiajn kapricojn de siaj unuhoraj gastoj. Sed ĉi-foje ŝi rifuzis kontentigi sian voreman klienton pretekste, ke ŝia intima karno ne eltenus bastonetojn. Ŝi ja legis, ke ĉinoj ĉiam uzas bastonetojn por manĝi... Ekestis disputo: Zora obstine skuis la kapon, ne komprenante la klarigojn ĵargonitajn de la ĉino. Kaj, kiam li prenis ŝian brakon, por treni ŝin en ĉambron, ŝi kriĉis kaj baraktis, frakasante du glasojn. Envenis mia amiko Ernesto. Ne sciante, pri kio temas, li tuj ekkaptis la protestantan ĉinon je la kolumo kaj, antaŭ ol mi povis interveni, ĵetis lin eksteren. Poste li laŭte deklaris, ke la Sentema Mimoso estas bonmora bordelo kaj ke li ne toleras tumulton en sia establo.

Kiam Ernesto sidiĝis apud ni, metante sian mastran manon sur la liberan gluteon de Tina, mi klarigis al li, ke la ĵusa bedaŭrinda incidento estis denove kaŭzita de la lingvaj baroj inter la popoloj. Mi profitis la okazon, por prediki la internacian lingvon:

— Ernesto, pripensu, ke, se Zora kaj la ĉina kliento estus parolintaj Esperanton, nun ŝi estus senpene gajninta iom pli da mono, kaj via gasto, kontentigite, prikantus la agrablaĵojn de la Sentema Mimoso ĝis la fundo de Azio.

Silente Ernesto ŝovis sian ĉapelon malantaŭen, jese balancante la kapon, kaj, kiam mi priskribis al li la doloron de la juna Zamenhof pro la malpaco reganta en Bialistoko inter malsamlingvaj komunumoj, mia tono iĝis tiel konvinka, tiel arda, ke la malmolkora Ernesto ne povis malhelpi larmon brili ĉe la rando de lia maldekstra okulo. La venko estis proksima.

— Ernesto, organizu Esperanto-kurson en la Sentema Mimoso.

Por montri sian konsenton, la bordelestro mendis botelon da ĉampano kaj deklaris, ke tiun vesperon mi rajtos ĝui la ĉarmojn de Tina senkoste.

Du tagojn poste mi komencis instrui la pensionaninojn de la Sentema Mimoso. Mi bedaŭras, ke la vesperaj gastoj ne povis vidi la grandan salonon transformitan ĉiumatene en klasĉambron por la deviga kurso. Ankaŭ Ernesto diligente lernis la dek ses

regulojn de la Fundamento. Li ne preterlasis unu lecionon, kaj baldaŭ li povis alkoĉi apud sia pordo belan kupran ŝildon: "Esperanto parolata".

La novaĵo diskuris tra la esperantistaj grupoj de la bervalo regiono, kaj ĉiuj viraj samideanoj volis ekkoni la unuan bordelon en la mondo, kie prostituitinoj oficiale pepas en la internacia lingvo. Multaj neesperantistoj, ne komprenante la signifon de la ŝildo, opiniis, ke temas pri nova diboĉa specialaĵo de la Sentema Mimoso, kaj eniris, por provi ĝin. Tina, Zora, Meta, Kalina kaj ties kunulinoj fervore klerigis tiujn gastojn, kaj preskaŭ ĉiuj poste decidis lerni Esperanton.

La entrepreno de Ernesto tiel ekprosperis, ke li parolis pri tiu sukceso dum kongreso de bordelestroj en Hamburgo. Pluraj kolegoj el Hongkongo, San-Francisko, Marsejlo, Rio-de-Janeiro kaj aliaj havenurboj tuj enkondukis tiun mirindan helpilon en siajn voluptovendejojn. Du aŭ tri skribis al Ernesto, por peti konsilojn de li.

Tiam mi antaŭvidis la neceson interligi la verdajn malĉastejojn, kaj kun Ernesto mi ellaboris la statutojn de nova societo, la Unuiĝo de Esperantistaj Amordomoj, mallonge UEA. Nian entreprenon rapide kronis granda sukceso, pruvo, ke ni plenumis urĝan bezonon de la homaro. Ĝis nun la kompatindaj vojaĝantoj, maristoj, komercistoj, misiistoj, kongresanoj, aviadistoj, ĵurnalistoj, kiuj migras tra la mondo, devis kontentiĝi per hazardaj renkontoj, fordoni sin al malnoblaj ĉiesulinoj, kiuj senhonte ekspluatit ilin, blinde fidi fremdajn konsilojn aŭ stultajn kutimojn kaj tial ofte trafi fiaskon, kiel la ĉino en la komenco de mia rakonto.

Poste la translima amorvivo estis pleje faciligata dank' al UEA. En niaj jarlibroj estis troveblaj la adresoj de 123 esperantistaj amordomoj en 17 diversaj landoj. Ĉe ĉiu adreso estis menciitaj la prezoj kaj la specialaĵoj (la t. n. fikfakoj) de la deĵorantinoj. Niaj domoj estis malfermitaj al ĉiuj, sed la UEA-membrokarto rajtigis postuli 30%an rabaton. Por akiri tiun privilegion, ĉiam pli da viroj aliĝis al UEA.

Ankaŭ grandan servon faris UEA al la Esperantomovado. Ĝi zorgis ekzemple pri la amuza parto de la internaciaj kongresoj. Du aŭ tri bordelestroj de la koncerna lando estis ĉiujare komisiataj delegi al la



kongreso difinitan kvanton da putinoj, kiuj sperte flegis la distradon de senokupaj fraŭloj aŭ de aliaj kompatindaj soluloj. Ĉu vi rimarkis lastan jaron, ke multe pli da viroj ol kutime ĉeestis la universalan kongreson? Kaj ke, dum nur virinoj preĝis ĉe la internaciaj Diservoj (kun prediko en Esperanto), la viroj ĝenerale preferis promeni en la ombraj parkoj aŭ simple ripozi en siaj hotelĉambroj? La statistikistoj atribuas tiun fenomenon al la 20%a dumkongresa rabato, kiu aldoniĝis al la kutima 30%a rabato.

Kaj kion diri pri la helpo donita al multaj lernintinoj, kiuj antaŭe ne sciis, kiel uzi siajn lingvajn konojn post la kurso? Nun ili povis konfidi sian sorton al nia societo, kaj, post vojaĝo al Libano aŭ al Sud-Ameriko, ni disponigis al ili loĝon, nutron, monon kaj idealan okupiĝon je la servo de la homaro. Tio estas ja pli alloga ol leki malnovajn poŝtmarkojn, por glui ilin en polva albumo.

Nia UEA do floradis plu, kiam unuavide negrava incidento skuis la fundamenton de nia organizo kaj trudis al ni kelkajn reformojn de la statutoj. Lun posttagmezon de majo tuta grupo de usonaj maristoj elŝipiĝis en Roterdamo. Post la vizito de pluraj drinkejoj, ili hazarde preterpasis konstruaĵon portantan nian siglon. Pensante, ke tiu domo estas nova amuzejo ankoraŭ ne menciita en la lasta jarlibro, ili tuj eniris kaj, prezentante siajn UEA-kartojn, postulis viskion kaj plezurdonantinojn je 30%a rabato. Kiam oni rifuzis tion al ili, ili ekkondutis skandale, blekante, ke ili plendos ĉe la Centra Oficejo de UEA en Bervalo pro tiu fia trompaĵo. Poste, serĉante en la ĉambroj iel uzeblajn inojn, ili fine trovis novan junan tajpistinon,

kiun ili perfortis sur ŝia labortablo, tiel difektante preskaŭ tute novan skribmaŝinon.

Tiu konsterna okazaĵo subite montris, ke ni ne sufiĉe atente elektis la nomon de nia societo. Ekzistis du UEA-oj: unu vegetanta en Roterdamo kaj unu prosperanta en Bervalo. Ĉar la alia, malgraŭ sia malgraveco, estis fondita antaŭ nia, ni grandanime rezignis la arbitracion de la Internacia Kortumo en Hago. Tiu roterdama UEA cetere ne povas konkurenci kun ni, ĉar ĝi okupiĝas nur pri la neŭtralaj (?) bezonoj de la homaro.

Nia honeste akirita fortuno ebligis al ni preni sur nin ĉiujn elspezojn. Ni aĉetis al la tajpistino novan verdan uniforman kalsoneton, al UEA novan skribmaŝinon kun supersignoj, kaj la enirejon de la Sentema Mimozo nun ornamas novaj neonlumigitaj literoj, kiuj anstataŭas la iaman siglon. Efektive ni deklaris al nia notario, ke, por eviti ĉian miskomprenon, nia societo de nun nomiĝas "Senpena Amorado Tutmonda".

Fonto: *Beaucaire L. El la vivo de bervalo sentaŭgulo. La Laguna, 1974, paĝoj 25-29.*

Represo: *Samideanoj: Satiroj kaj humuraĵoj pri Esperanto kaj pri esperantistoj. Kaliningrado, 2006, paĝoj 38-40.*



Fonto: **La Ondo de Esperanto** <https://sezonoj.ru/2020/01/beaucaire>

Por venki rugbeajn miksbatalojn...

Por venki rugbeajn miksbatalojn, donu vian 40% — raportaĵo de marioo el Kanado

Via rugbeotrajnisto certe ĉiam diras stari malalte dum miksbataloj. Intuicie oni scias, ke, por puŝi pli forte kontraŭ kontraŭstara rezisto, oni devas malaltigi onian centron de maso kaj planti siajn piedojn solide sur la teron. Tiamaniere pli multe de



verkis kaj sendis marioo el Kanado

sian energio estos transdonita antaŭen kaj pli potenca estas la miksbatalo. Tamen, ĉu trejnistoj povas precize diri, kiel malaltaj rugbeistoj devas poziciigi sin por maksimumigi la potencon de miksbatalo?



En rugbeo, teamoj, kiuj lernas pli bonajn teknikojn por pli forte puŝi dum miksbataloj, akiras taktitan avantaĝon. Sciencistoj el Kalifornio, Usono, traserĉis la literaturon por pli bone kompreni la biomekanikajn postulojn dum la daŭra puŝa fazo de miksbatalo.

La esplorantoj, Eric Martin kaj George Beckham el Kalifornia Ŝtata Universitato, identigis dudek ses eldonitajn studaĵojn, kiuj prezentas datumojn pri estigo de fortoj en rekta aŭ simulita rugbea miksbatalo. La studitaj ludantoj estis plenkreskaj maskloj, kiuj aplikis daŭrajn fortojn inter 1000 kaj 2000 neŭtonoj kiam solaj, kaj 4000-8000 neŭtonoj kiam en plenaj pakoj.

("Neŭtono" estas la mezurunuo de forto.)

Tra la analizo de datumoj, la esplorantoj konfirmis, ke la optima pozicio, t.e. kiel puŝi kun la plej multa efika energio, estas teni la ŝultrojn je 40% de la korpa alteco kun paralelaj piedoj kaj genua/koksa angulo de 120 gradoj. Krome, ili taksis, ke miksbatalpako necesas 10% pli grandan forton ol tiu de la alia pako por forpuŝi ilin.

Vi, rugbi-ludantoj, kompreneble jam scias pri malaltaj ŝultroj kaj larĝa genua/koksa angulo. Krom nun, kun precizaj sciencaj ciferoj — 40%, 120 gradoj — vi havas rimedon por atingi 10% pli da forto ol aliaj

pakoj kaj venki miksbatalojn.

Fonto: Martin, E., Beckham, G. "Force production during the sustained phase of Rugby scrums: a systematic literature review." *BMC Sports Sci Med Rehabil* 12, 33 (2020). <https://doi.org/10.1186/s13102-020-00174-z>

verkis kaj sendis **marioo** el Kanado

desegnaĵo **Camille Bertrand-Morel** el Kanado

25>>



mono kaj vestaĵoj. Ni ankoraŭfoje rememoras la valorojn de braveco, virto kaj amo tra la vivrakonto de

lia patro, Seibei, en la amoplenaj rememoroj de sia filino. La rolado estas ege simpla. La reĝisoro Yōji Yamada lasis neforgeseblan verkon en la historio de kino kun ĉi tiu scenaro (kaj filmo), kiun adaptis kune kun Yoshitaka Asama el la novelo de Shūhei Fujisawa.

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal**
Buyukada, Istanbul
21 junio 2020

kaŝos ĝin en lokon, kie ili neniam trovos ĝin.

La problemo estis kie eltrovi kaŝejon. Kunvokite al konsilio aliaj dioj proponis:

"Ni kaŝu la homan diecon sub la tero," sed Bramo respondis, ke la homo scias kavigi kaj li ĝin trovos.

"Ni kaŝu la homan diecon funde de oceanoj," sed Bramo respondis, ke la homo iam lernos plonĝi kaj li ĝin trovos.

La dioj tiam konkludis, ke ne ekzistas kaŝejo por la homa dieco kaj Bramo diris:

"Mi scias pri la nura loko, kie la homo neniam serĉos."

Ekde tiu tempo, laŭ la legendo, la homo renversfos kaj kavigas la teron, trairas kaj serĉas en marfundoj, sed neniam rigardas, kie estas kaŝita lia dieco – funde de si mem.

Fonto: **Legolibreto** 2 de Jindřiška Drahotova



Solvu de la
krucvortenigmo

A	T	E	A	L	A	S	E	F	O	N	U	S	O	N	A	N	O
A	K	M	A	S	E	R	E	L	A	S	O	H	I	M	I	C	O
A	S	E	K	S	T	E	P	A	R	A	M	A	R	A	A	G	A
A	R	B	E	S	T	U	L	I	K	O	N	T	R	E	M	A	K
A	D	B	O	S	A	N	O	I	T	O	N	O	J	A	N	O	J
A	S	E	K	A	A	J	O	N	O	D	O	K	A	S	U	P	O
K	O	L	A	L	E	Z	O	F	A	R	A	S	T	E	T	O	K
L	I	K	I	V	I	L	O	R	A	A	S	*	*	*	*	*	*
E	R	A	A	V	I	L	O	R	A	A	S	*	*	*	*	*	*
U	S	R	A	N	L	O	R	A	A	S	*	*	*	*	*	*	*

Vortoj de Ludoviko Zamenhof

"Mi estas homo, kaj por mi ekzistas nur idealoj pure homaj. ... Ĉiajn idealojn kaj celadojn gence-naciajn mi rigardas nur kiel grupan egoismon kaj hommalamon, kiuj pli aŭ malpli frue devas malaperi, kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo. ... Mi kredas, ke ĉiuj popoloj estas egalaj ... , ke ĉiu homo havas rajton paroli kian lingvon li volas, ... konfesi kian religion li volas, sed en komuniĝado kun homoj de alia deveno li devas, kiom ĝi ebla, uzadi lingvon neŭtrale homan. Ĉiun celadon de unu homo, altrudi al aliaj homoj sian lingvon aŭ religion, mi rigardas kiel barbarecon. ... Mia religio mi nomas tiun religion, en kiu mi naskiĝis, aŭ al kiu mi estas oficiale alskribita; sed al ĝia nomo mi devas ĉiam aldoni la nomon "hilelista", por montri, ke mi konfesas ĝin laŭ la religiaj principoj de la hilelismo, kiuj konsistas el jeno:

- sub la nomo "Dio" mi komprenas tiun al mi nekompreneblan plej altan Forton, kiu regas la mondon, kaj kies esencon mi havas la rajton klarigi al mi tiel, kiel diktas al mi mia saĝo kaj koro.

- kiel fundamentan leĝon de mia religio mi rigardas la regulon "agu kun aliaj tiel, kiel vi deziras, ke aliaj agu kun vi, kaj aŭskultu ĉiam la voĉon de via konscienco" ...

- mi konscias, ke ĉiu homo apartenas al tiu aŭ alia tradicia religio ne tial, ke ĝi la plej multe respondas al liaj personaj konvinkoj, sed nur tial, ke li en ĝi naskiĝis, kaj ke la esenco de ĉiuj religioj estas la sama; ... Tial mi konscias, ke oni nenion povas laŭdi nek mallaŭdi por lia tradicia religio, kaj ke bonaj aŭ malbonaj agoj de homo dependas ne de lia religio, sed nur de li mem kaj de la cirkostancoj de lia vivo."

El la libro „La homo, kiu defiis Babelon“

René Centassi – Henri Mason, L’Harmattan
2001

Fonto: **Legolibreto 1** de Jindřiška Drahotova

El la libreto "Rakontoj pri Afanti"

- Ĉinaj Popolaj Rakontoj – Ĉina Esperanto-
Eldonejo, Pekino 1982

Neniu scias nun

Kiam Afanti mem fariĝis loka juĝisto, multaj homoj konkuris amikiĝi kun li. Iu laŭdis lin: „Nasredin, vi estas tre admirinda, ke vi havas tiom da amikoj!“

Afanti respondis: „Kiom da amikoj mi havas, neniu scias nun. Nur post kiam mi ekziĝos de la juĝisteco, oni povos ekscii, kiuj vere estas miaj amikoj.“

**Mandareno en boato**

Iu mandareno neniam antaŭ veturis per boato. Foje li kune kun Afanti transiris riveron per boato, kio estis la unua fojo en lia vivo. Kiam la boato atingis la mezon de la rivero, tio ege timigis lin. Li, tremante pro timo, forte tiris la baskon de Afanti kaj senĉese petadis: „Bona Afanti, Bona Afanti! Mia koro elsaltos pro timo, elpensu rimedon por mi!“

"Unu rimedo ja ekzistas, via moŝto, sed mi ne scias, ĉu vi volas akcepti ĝin aŭ ne?"

"Kial ne, Afanti? Mi volonte konsentas ion ajn. Rapidu, mi petas," insistis la mandareno.

"Bone," diris Afanti, „do vi spertu unue en la akvo," kaj puŝis lin en la akvon. Post kiam la mandareno jam kelkfoje subakviĝis, Afanti kaptis lian hararon kaj tiris lin en la boaton.

Tiam la mandareno ne plu timis esti en la boato. Afanti afable demandis lin: "Kiel vi nun sentas vin? Ĉu vi ankoraŭ timas?"

"Ne, ne, nun mi sentas min tre komforta," rapidege respondis la mandareno, tremante pro malvarmo.

"Jes!" meditis Afanti. „Tiu, kiu neniam vojaĝis per la piedoj, ne scias kiel bone estas rajdi sur ĉevalo; tiu, kiu neniam subakviĝis, ne sentas la sekurecon de boato. Kiel vi povas kompreni malsaton de la malriĉuloj, se vi ĉiam manĝas bongustan kuskuson?“

Honto

Foje ŝtelisto venis en la hejmon de Afanti. Afanti ekvidis lin kaj tuj sin kaŝis en keston.

La ŝtelisto serĉis ĉie en la ĉambro, sed nenion ŝtelindan trovis. Fine li malfermis la keston kaj kun eksalto vidis Afanti: "Ha! Kion vi faras en la kesto?"

"Nu, ĉar en mia hejmo troviĝas nenio, kio plaĉas al vi, mi tre hontas kaj pro tio kaŝis min en la kesto," respondis Afanti.

Hindia legendo sendita el Brazilo

Antikva legendo el Hindio rakontas, ke antaŭ multe da tempo ĉiuj viroj kaj ĉiuj virinoj estis dioj.

Ili tiom trouzis siajn diajn povojn, ke Bramo, la dia majstro, decidis, ke li forprenos ilian dian povon kaj

>>31